

revuo

esperanto

marto 1965

58-a jaro

n-ro 712 (3)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 41 Ĉiufankaj progresoj sur la lerneja kampo
- 42 Pri la agado de la lokaj grupoj:
2. Unikaj eblecoj por informado sur loka
nivelo (Becker)
- 43 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
- 44 Lerneja bulteno n-ro 4:
2-a Internacia Konferenco de Lernejoj, 1965
Informoj en kelkaj linioj
- 46 Pri ideologio kaj ŝtato (Seminario de GEJ)
- 48 Rio de Janeiro 400-jara (Mabesoone)
- 51 Lingvaj problemoj en Gronlando (Kustosz)
- 52 CED
- 53 Recenzoj
- 54 Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologoj Hyde, Moolenaar, Kolbeins
- 55 Mallongaj novaĵoj
50-a Universala Kongreso, Tokio, 1965
- 56 La kongresejo en Tokio
Eŭropa Esperanto-Konferenco, Vieno, 1965
Laŭlanda membro-statistiko 1964
- 57 En la grupoj
- 58 La Juna Vivo
21-a IJK de TEJO, Oocu, 1965
- 59 Oficiala informilo n-ro 377
Akademio de Esperanto
Esperanto en radio
- 60 Anoncetoj

kovrila bildo

F-ino Brazilo 1964 (Vera Lúcia) salutas la
400-jaran urbon Rio de Janeiro (vidu p. 48).

bildojn liveris

- 46 Deutsche Presse-Agentur
- 53 Stafeto
Eldonejo Flensted

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef. (010) 23 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Teksto de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Jam kvinfoje la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA enketis tutmonde pri la lerneja instruado de la Internacia Lingvo. Ĉiufoje, la rezultoj montris akceliĝantan kreskon de la nombro de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. Baldaŭ okazos la sesa enketo de CED sur tiu kampo. Sed jam nun la spontaneaj raportoj el diversaj terpartoj donas bazon por esperoj, ke la kresko ankoraŭ ĉiam rapidiĝas.

Precipe gravaj estas la diverslandaj leĝoj, leĝproponoj aŭ ministraj decidoj, permesantaj instruadon de Esperanto sub pli favoraj kondiĉoj ol antaŭe. Resumo pri kelkaj tiaj dekretoj en Bulgarujo, Hispanujo, Hungarujo, Israelo kaj Nederlando aperis en "Lerneja Bulteno n-ro 3" ("Esperanto" 1964, dec. p. 210). Inter alie rezultis, ke granda nombro da lernejoj en Bulgarujo enkondukis la lingvon nedevige, ke dekoj da hungaraj instruistoj ekzameniĝis pri Esperanto, ke pluraj kursoj komenciĝis en lernejoj de Tel Aviv kaj, plej laste, ke du lernejoj en Hago ĵus komencis kursojn por 68 infanoj laŭ la nova leĝo.

Sed intertempe ankaŭ en aliaj landoj plifirmiĝis la oficiala pozicio de Esperanto en la lernejoj. En Brazilo, ekzemple, la decido en 1962 de la Federacia Konsilantaro pri Instruado pri laŭelekta enkonduko de la lingvo ankoraŭ nun disvolviĝas sur ŝtata (regiona) nivelo. La pioniran ekzemplon de la ŝtato São Paulo ("Esp." 1963 p. 172) sekvis je la 14-a de oktobro 1964 la ŝtato Guanabara, kies leĝodona asembleo per leĝo n-ro 588 enkondukis Esperanton kiel elekteblan fakon en mezgradajn lernejojn de Rio de Janeiro. Rezulte de la sama federacia decido, la grava institucio "Nacia Kampanjo de Senpagaj Edukejoj", kiu funkciigas 250 gimnaziojn en Brazilo kun registara subteno, enkondukis kursojn en kvar siajn lernejojn, kaj poste sekvigis aliajn. En Pollando, pedagogia lernejo en 1965 unuafoje donos poentojn pri Esperanto sur diplomoj por estontaj instruistoj, dum en Usono la instruista kurso raportita en la januara "Esperanto" donas poentojn, kiuj influas poste la salajrojn. Ankaŭ en Britujo, kies sinteno influas al aro da aliaj anglalingvaj landoj, la oficiala pozicio pliboniĝis per la fakto, ke du regionaj instancoj aranĝas ekzamenojn pri Esperanto por mezgradaj lernejoj.

En aziaj landoj la progresoj havis alian formon. Elektitaj instruistoj el 11 altaj lernejoj en ses ĉinaj urboj partoprenis 6-monatan ŝtatan seminarion aranĝitan de la Eduka Ministerio kaj nun instruas siavice al elektitaj studentoj en siaj respektivaj lokoj. Okazis kurso ankaŭ en la pedagogia instituto de Pjengjang, Norda Koreujo, dum en la suda parto de tiu dividita lando okazas pluraj mezlernejaj kursoj. Pri la situacio en Nov-Zelando raportis la novembra "Esperanto".

Malpli tujajn perspektivojn prezentas la

evoluantaj landoj de Afriko kaj Azio. En tiuj, kie unu indiĝena lingvo estas jam elektita kiel nacia lingvo (ekz. Cejlono, Etiopio), la pozicio de la eks-oficiala(j) lingvo(j) malfortiĝas kaj kreas laŭgrade pli favorajn kondiĉojn por enkonduko de Esperanto por internacia komunikado. Ĝenerale, en tiaj landoj ekzistas jam iaj eblecoj por instrui Esperanton en lernejoj — nur mankas la instruistoj.

Antaŭkondiĉoj por pluaj progresoj

Kion necesas fari nun por konservi la ĝisnunajn atingojn en la lernejoj kaj por akiri novajn? Kiel kutime, la bezonata agado estas triflanka, responde al la tri aspektoj: informi, apliki kaj instrui.

Kiel emfazas s-ro Markarian en sia studo "La eduka valoro de Esperanto-instruado en la lernejoj" *, la esenca valoro de tiu instruado en la nuna stadio estas ĝia rolo en "edukado por internacia kompreno": la evoluigo ĉe la lernanto de internacia pensmaniero, respekto por aliaj popoloj kaj kulturoj, scivolo pri ilia vivmaniero. Ĝuste tiun aspekton necesas pozitive akcenti en ĉiu informagado en lernejoj.

Sed necesas ankaŭ pruvi siajn asertojn: la ekzistantaj kaj ekzistontaj lernejaj kursoj devas konvinke realigi tiun potencialan valoron per praktikaj aplikoj. Tre taŭga ekzemplo estas la infana grupo "Junaj ambasadoroj" en Bjelovar, Jugoslavio, kies ĉiu ano estas "ambasadoro" de iu elektita lando. Ilia tasko estas ĉiel — precipe koresponde — konatiĝi kun la koncerna lando kaj raportoj pri ĝi al la grupo. Per tiaj aplikoj evidentiĝas al la tuta lernejo la unikaj avantaĝoj de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj studataj.

La tria aspekto estas la didaktika. La instruarto rilate Esperanton estas ankoraŭ en sia infaneco. Kvankam ĉiu studobjekto, kaj same ankaŭ ĉiu lingvo postulas propran instruometodon, tro ofte ankoraŭ Esperanto estas instruata per metodoj ellaboritaj por iu alia lingvo. La fakto, ke la Internacia Lingvo estas nek fleksia, nek aglutina, nek slava nek latina, sed vere unika laŭ strukturo, devas signifi, ke por ĝi necesas propraj, unikaj instrumentoj.

Ne estas do hazardo, ke la ĉefaj sekcioj de la 2-a Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata, okazonta en aŭgusto en Britujo, estos dediĉitaj ĝuste al "Internacia kompreniĝo en la lernejo" kaj "Pedagogiaj problemoj de Esperanto-instruado". Plena programo de la Konferenco estas jam ellaborita (vidu p. 44, kaj p. 208 en la decembra "Esperanto"). Ĝia sukcesigo per la ĉeesto kaj kunlaboro de ĉiuj instruistoj signifos antaŭenpuŝi Esperanton en la lernejoj al pozicio neniam antaŭe atingita. V. Sadler

*) CED Dok. B/I/2, 0,80 gld., 2 rpk.

2 UNIKAJ EBLECOJ POR INFORMADO : SUR LOKA NIVelo

La Lokaj Grupoj estas kaj restos la kerno de nia movado. La lokaj grupoj respegulas dum la plej granda parto de la jaro la esperantistan vivon, kvankam ĝi povas esti pli intensa en esperantistaj familioj, eble internaciaj familioj, uzantaj Esperanton kiel familian lingvon, aŭ pli forte pulsas precipe dum la konferencoj, seminarioj, ferirestadoj kaj kongresoj. Tamen la konstanta kaj multflanka laboro de la lokaj grupoj estas por la unuopa esperantisto la plej granda instigilo por plua laboro, por lingva spertiĝo, komuna estado kun geamikoj — en unu vorto esperantista vivo. Kaj kiu izolita esperantisto ne sopiras al loka grupo kaj streĉas ĉiujn siajn fortojn por fondi ĝin?

La graveco de la lokaj grupoj estas tre granda el ĉiuj vidpunktoj, sed precipe el la vidpunkto de la informado. Kiel ni scias, la informado pri la Internacia Lingvo estas ne nur la tasko de la internacia movado kaj de la Landaj Asocioj, sed antaŭ ĉio gravega parto de la laboro de la lokaj grupoj, eĉ se tio ne estas tro sentebla dum la grupkunvenoj. Ni devas informi la homojn pri Esperanto kaj ĝiaj atingoj. Kaj laŭ mia opinio, tio estas plej facile efektivebla sur loka nivelo per la informa laboro de la grupo kaj kompreneble ankaŭ per la persona informado de la membroj de tiu grupo. Kiel nun realigi tiun informadon de la lokaj grupoj?

Sur tri niveloj

Kompreneble estas pli facile konstati neceson de iu afero ol efektivigi ĝin, estas pli facile paroli ol fari ion, precipe ĉar temas pri tiel kompleksa agado en tiel malsamaj kaj ofte malfacilaj kondiĉoj. Mi plene konscias pri ĉio tio. Tamen unu afero devas esti dekomence klara: ĉiu loka grupo devas havi Lokan Informan Fakon gvidatan de komisiito aŭ malgranda komitato, organizita laŭ la modelo de la landa Informa Fakoj kun komprenebla adapto al la lokaj cirkonstancoj. Ĉar la landaj Informaj Fakoj organizas la samajn branĉojn laŭ la modelo de la Informa Fakoj de UEA, ni havas similan informan laboron sur ĉiuj tri niveloj. Sed nur se tiuj trinivelaj informaj fakoj bone kunlaboras, se ĉiuj sugestoj estas ĉiam transdonataj al la lokaj unuoj, la informado entute funkcias.

Ni do en la lokaj grupoj rilate la Informan Fakon konsideru la diversajn branĉojn de la informado, unuavice la Gazetaran Servon. La lokaj grupoj helpu la Landan Asocion rilate la aperigon de la informoj de la Internacia Gazetara Servo kaj enlandaj aldonoj en la lokaj kaj distriktaĵaj gazetoj kaj ĉiam raportu pri la interesaj programoj de la kunsidoj. Oni ofte spertas, ke landaj aŭ regionaj gazetoj

pro manko de spaco aŭ pro aliaj kaŭzoj ne volonte transprenas ĉiujn informojn, kiujn ni sendas tiurilate. Laŭ miaj spertoj ili ĉiam aperas, se ili estas bone enlaboritaj en la raportojn de la lokaj grupoj. Kompreneble tiam la informo nur aperas en unu distrikto aŭ eĉ nur en unu urbo, sed pli bone ol nenie — kaj se en alia distrikto alia grupo agas simile... Ĉar la lokaj eldonoj de gazetoj ĉiam disponas pri spaco, estas ankaŭ facile enmeti fotojn. Eĉ la radio kaj la televido pli facile raportas pri gravaj lokaj okazintaĵoj rilate Esperanton ol ili akceptas ĝeneralan informadon.

Ĉiu loka grupo disponu pri certa stokoj da ekspozicia materialo, kiun ĝi utiligu por la plej diversaj okazoj, eĉ por tute malgrandaj ekspozicietoj en montrofenestroj de librovendejoj, urbaj aŭ lerneaj bibliotekoj, por prelegoj ĉe popolaltlernejoj aŭ ĉe organizaĵoj, precipe junularaj.

Estas preskaŭ nebezzone menciigi, ke la Informa Fakoj de la loka grupo organizas pendiĝon de afiŝoj, disdonadon de flugfolioj, varbpoŝtkartoj kaj vendadon de varbbroŝuroj je certaj okazoj, precipe antaŭ la komenco de la kursoj, kaj daŭre prizorgas la montrokeston.

Ĉe aliaj organizaĵoj

Per prelegoj precipe ĉe aliaj organizaĵoj oni ne nur informu ĝenerale pri Esperanto, sed speciale atentigu pri la eblecoj, kiujn donas Esperanto por la internacia laboro kaj la internaciaj kontaktoj de la koncerna medio. Ofte esperantistoj estas membroj de tiuj organizaĵoj, ĉar multfoje nur membroj sukcesas peri prelegojn; pli bone ili fondu esperantistan grupon en la kadro de la alia organizaĵo ol ke ties gvidantoj timu, ke parto de la membroj forkuros al la esperantista grupo. Ĉar esperantista grupo ĉiukaze ne povas esti tro granda, oni zorgu, ke precipe junulara grupo fondiĝu, sed ankaŭ aliaj, se neceso montriĝas. Ofte tamen ili havu komunajn kunsidojn pro gravaj eventoj ktp. Tiamaniere la informaj eblecoj kreskas. Ekzemple al lumbildprelegoj de junulara grupo estas pli facile inviti interesiĝantajn gejunulojn ol al grupo de plenkreskuloj.

De tempo al tempo pro gravaj eventoj, komenco de kampanjoj, kiel ekzemple la agado por la Jaro de Internacia Kunlaboro, la Loka Informa Fakoj organizu bone preparitan Gazetaran Konferencon. Ĝi prezentu bone motivitan prelegon aŭ plurajn prelegojn de diversaj kunlaborantoj, donante la enhavon en konciza artikola formo al la ĵurnalistoj, tiamaniere evitante la riskon de miskomprenoj kaj misprezentadoj, ĉar grandparte la ĵurnalistoj ne multe ŝanĝas la raportojn,

Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

Stato je la 16-a de februaro

La ĝisdata statistiko pri subskriboj ricevitaj en Rotterdam montras jenajn sumojn: revenis entute 1915 subskribo-folioj kun subskriboj de 34 898 individuoj en 36 landoj kaj de 191 organizaĵoj en 19 landoj kun entute pli ol 2 786 000 membroj. Generale oni povas diri, ke la varbado de organizaĵoj montras kontentigan progreson, kaj ke la kolektantoj same bone laboras por ricevi apogon de eminentuloj. Aliflanke, la nombro de individuaj subskriboj povus esti jam multe pli alta. Por ke ankaŭ tiu nombro havu ian pezon kaj estu disanoncebala per la neesperanta gazetaro ĝi devas esti almenaŭ plurcentmila. Tial solidareco en ĉi tiu afero estas absolute esenca. Per prokrasto aŭ eĉ malaktivo en la kampanjo, unuj membroj aŭ organizaĵoj povas ne nur nenion kontribui mem, sed eĉ rezultigi, ke la brila laboro de aliaj ne estas plene utiligebla.

Bonaj ekzemploj ne mankas

Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko turnas sin al la estroj de ĉiuj 50 ŝtatoj de la Federacio. La unua, kiu subskribis, s-ro Albert D. Rosellini, estro de la pacifika ŝtato Washington, respondis:

"Ĉiu strebo farata por pligrandigi la kunlaboron inter la popoloj, por malpliigi la streĉitecojn, meritas nian konsideron."

En diversaj landoj subskribis konataj politikistoj: en Germanujo la dua prezidanto de la Socialdemokrata Partio de Germanujo, Herbert Wehner; en Francujo la iama ĉefministro Guy Mollet; en Belgujo la prezidanto de la Belga Socialista Partio, Léo Collard, eksministro. Grava sukceso en Danlando estas subskribo de la nuntempa ministro pri instruado, s-ro K. B. Andersen. Kaj li kaj la ministro pri kulturo krome akceptis proponon de persona interparolo pri la Internacia Lingvo. Krom parlamentanoj k.s. en Germanujo, Francujo, Finnlando, Danlando, Nederlando kaj Svisujo, notindaj estas pluraj membroj de regionaj registaroj en Germanujo, kaj provincestro en Nederlando. Inter la urbestroj

(daŭrigo de maldekstre)

eĉ se dum la demandado ili ne estas tute kontentaj.

Kompreneble ekzistas multaj aliaj favoraj eblecoj por bone informi kaj atingi la celon de la informado, por prepari bonajn eblecojn por instruado, ne nur en lernejoj, sed ankaŭ per gazetaj, radiaj kaj televidaj kursoj, kaj por helpi al la plimultigo de la eblecoj de praktika utiligo ĝenerale kaj en la diversaj fakoj: utiligo de la magnetofona kaj filma servoj de UEA, vizito de eksterlandano aŭ interŝanĝo kun eksterlanda grupo, vasta internacia korespondado, utiligo de la delegitaj servoj, eĉ amuzaj vesperoj kaj dancvesperoj kun esperantaj kanzonoj donas bonajn eblecojn por informado. Daŭre oni parolu pri la radiostacioj, kiuj regule elsendas en la Inter-

elstaras tiuj de Lyon, Francujo kaj Wiesbaden, Germanujo. La unuaj listoj el Hindujo inkluzivas 4 profesorojn de la Universitato de Illahabad. La apartan deklaron, publikigitan en la decembra "Esperanto" 1964, kaj subskribitan de la dana ĉefministro, de tiam subskribis ankaŭ s-ro Ulrik Rosing, programsekretario de la gronlanda radio, kaj s-ro Eiler Jensen, prezidanto de la dana landorganizaĵo de sindikatoj.

La jasmenciita Eiler Jensen estas figuro tre konata en Danlando, kaj lia apogo estas tre grava por plua varbado. Laŭ decido de la plenumkomitato de lia organizaĵo, li povis subskribi la Proponon al UN ankaŭ en ĝia nomo. Ĝi estas ĝis nun — kun 825 000 membroj — la plej granda organizaĵo atingita. Sed ĝian ekzemplon jam sekvis alia samspeca: la Nederlanda Konfederacio de Sindikatoj (525 000 membroj). Aliaj notindaj estas la Franca Ligo por Unesko, kaj la nederlanda Partio de Laboro (144 000).

Plimulto de laboristoj kaj oficistoj

Laŭ analizo de la unuaj 20 000 subskriboj kolektitaj, preskaŭ 50% el ĉiuj estas klasigitaj kiel laboristoj aŭ oficistoj. El la ceteraj, ĉirkaŭ duono (kvarono de la tuto) estas studentoj, lernantoj aŭ dommastrinoj. Instruistoj konsistigas 8,2% de la sumo.

Kelkaj kolektantoj aplikas originalajn kaj ofte imitindajn metodojn: s-ro Ib Schleicher, la dana komisiito, atingis ke alia organizaĵo (Martinus-Instituto) distribuu la foliojn al siaj propraj membroj. Studentaj kolektantoj en la Universitato de Kalifornio utiligis la okazon por samtempe varbi studentojn al nova kurso de Esperanto.

Fine, ni alvokas al ĉiuj membroj kaj organizaĵoj sur ĉiuj niveloj, streĉi ĉiujn fortojn por plena sukcesigo de la kampanjo. Aparte ni rekomendas trastudi zorge la instrukciojn presitajn sur la subskribo-folioj, por ke neniuj klopodoj estu nevalidaj kaj por eviti malŝparon de tempo en la C.O. Antaŭdankon!

nacia Lingvo, pri nia literaturo traduka kaj originala, pri ĝeneralaj kaj fakaj vortaroj ktp. Oni prezentu sian opinion pri problemoj de la lingvodiverseco, bone farebla per la rubriko "Leteroj de la legantoj" de la gazetoj. Oni energie rebatu ĉiujn atakojn kontraŭ Esperanto — ĉiukaze oni informu objekte kaj ne altrude.

Se oni tiamaniere egale atentis ĉiujn branĉojn de informado kaj ilin paralele aplikas, se certa elasteco laŭ la variaj kondiĉoj de diversaj landoj kaj medioj estas observata, tiam ankaŭ la Lokaj Informaj Fakoj en harmonia kunlaboro kun la Landaj Informaj Fakoj kaj la Informa Fakoj de UEA helpas definitive favorigi la publikan opinion al Esperanto.

Günther Becker




la jaro de internacia
kunlaboro, jaro de la
int. lingvo esperanto

Eiler Jensen, la
prezidanto de la plej
granda organizaĵo ĝis
nun subskribinta la
Proponon al U.N.



esperanto
marto 1965



La 2-a Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata

13-20 aŭg. 1965, Britujo

PROGRAMO

Sekcio

- I. 'Internacia Interkompreniĝo en la Lernejo — La Rolo de la Internacia Lingvo'. Tiu ĉi temo estos pritraktata per prelegoj kaj ĝeneralaj diskutadoj.
- II. 'Pedagogiaj Problemoj en Esperanto-Instruado'. Tiu ĉi temo ebligos la laŭfakan kuniĝon de la delegitoj en seminarioj. Kunvenos aparte instruistoj en:
1. Universitatoj, 2. Porinstruistaj Lernejoj, 3. Popolaltlernejoj/Vesperlernejoj, 4. Teknikaj, Komercaj kaj aliaj specialaj Lernejoj, 5. Duagrada Lernejoj, 6. Elementaj Lernejoj, 7. Blindulaj Lernejoj.
- Ve. 13 Alveno de la delegitoj.
Unuaj renkontiĝoj de la ĉefdelegitoj kaj raportantoj, kaj decido pri la labororganoj.
- Sa. 14. Interkonatiĝa mateno. Komuna fotado.
Solena Malfermo (14.30 h)
Enkonduka prelego 'La Jaro de Internacia Kunlaboro — La Rolo de Esperanto' (Prof. D-ro I. Lapenna — Britujo)
- Di. 15 Neoficialaj Diservoj.
Programsekcio I. 'Asociiĝintaj Lernejoj de UNESKO' (Prof. D-ro I. Lapenna)
Programsekcio II. 'Nova Aŭdvida Metodo por Esperanto' (S-ro A. Sekelj - Jugoslavio)
Orgenkoncerto S-ro D. Hill.
- Lu. 16 I. 'La Deviga Instruado de Esperanto'
I. *La Lerneja Esperanto-Grupo'*
II. *Seminarioj*

Ma. 17 Tuttaga Ekskurso al la Universitata Urbo Cambridge.

Me. 18 I. 'La Kontribuo de la Infankongresoj al Internacia Interkompreniĝo'

(S-ro P. Buttinger — Britujo)

I. 'Lernejoj Vojaĝoj Alilanden'

(S-ro N. Williams - Britujo)

II. *Seminarioj*

I. 'Junulara Agado en la Lernejoj'

(S-ro H. Behrmann - Germanujo)

I. La celoj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

"Edukado Internacia", oficiala organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en numero 78 (la lasta en la pasinta jaro) publikigas la unuan el du proponoj pri la nova statuto de ILEI. La aŭtoro de la propono estas S-ro Vukomanović el Jugoslavujo. La dua paragrafo parolas pri la celoj de la Ligo, kiuj devas esti jenaj:

- a) Unuigi ĉiujn instruistojn esperantistojn en la mondo por plane kaj sisteme labori pri enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn,
- b) organizi reciprokajn interŝanĝojn de spertoj de monda Esperanto-instruistaro rilate al ĉiufanka plibonigo kaj modernigo de Esperanto-instruado,
- c) organizi praktikadon de Esperanto en instruista fako kaj lerneja medio por ke ĝi servu al ilia evoluo kaj progreso,
- ĉ) eduki geinstruistojn kaj gelernantojn en la mondo je sento de internacia solidareco kaj reciproka estimo-interfratiĝo kaj helpado.

Verŝajne ILEI suriris la novan vojon de agado, sur kiu ni povas bondeziri al ĝi sukcesojn.

II. Jarkunveno de ILEI en Londono?

La Estraro de ILEI klopodas elekti por nuna jaro konvenan lokon por la jara kunveno. Oni proponis interalie la lokon de 2-a Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata. Ni opinias ankaŭ, ke la loko estas bone elektita. En Tokio ĝi ne povas okazi, ĉar la Kongreson nur malmultaj reprezentantoj de ILEI povos veturi.

III. La 2-a Internacia Pedagogia Esperanto-Tendaro en Szeged (Hungarujo).

En la suda parto de Hungarujo apud la rivero Tisza situas la bela hungara urbo Szeged. La historio de tiu urbo komenciĝis en la XIIa jarcento. Ĝi posedas ankaŭ Esperanto-Muzeon kaj Esperanto-Bibliotekon. Dum aŭgusto okazas tie ĉiujare internaciaj Art-festivaloj. En kuranta jaro de la 10-20 de aŭgusto loka Pedagogia Grupo de HEA organizas tie Internacian Tendaron por Pedagogoj kaj ankaŭ por estontaj pedagogoj, kiuj nur interesiĝas pri la kursgvidado aŭ kiuj intencas instrui Esperanton en la lernejoj. Paralele al pedagogia tendaro oni organizas ankaŭ internacian tendaron por gelernantoj kun aparta programo. La loĝado kun manĝado dum 10 tagoj kostos 400 forintojn, kaj la partoprenkotizo 200 forintojn.

La programo de la tendaro estas tre riĉa kaj certe kontentigos diversajn gustojn de la partoprenantoj. Okazos prelegoj, kunvenoj, renkontiĝoj, film- kaj teatraj-prezentoj, tendarfajroj, amuzvesperoj kaj diversaj ekskursoj. Oni povos ankaŭ fari "A" kaj "B" ekzamenojn. Inter la prelegantoj kaj ekzamenantoj estos Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay.

Aliĝojn oni akceptas ĝis 30 de aprilo 1965. Adreso por korespondado: Pedagogia Grupo de HEA - SZEGED - Aprilis 4 u. 1, Hungarujo.

IV. La Via Tutpollanda Konferenco de Esperantistaj Instruistoj en Varsovio.

La 3-an kaj 4-an de januaro okazis en Varsovio jam Via tradicia konferenco de Polaj Instruistoj Esperantistoj organizata ĉiujare dum vintraj ferioj de la lernejoj. Ĉi-jare ĝi okazis en sidejo de Pola Esperanto-Asocio. Partoprenis ĝin delegitoj el 15 lokoj el tuta Pollando. Oni pridiskutis diversajn temojn interesantajn instruistojn de Esperanto — unuavice kompreneble lernolibrojn kaj programojn de instruado, organizadon de feriaj kursoj, kaj la duan tagon oni elektis la novan estraron de Instruista Sekcio ĉe PEA, kiu estas samtempe la filio de ILEI en Pollando. La novaj duŝupaj programoj prilaboritaj de Andreo Pettyn el Varsovio jam estas ĉe Ministerio de Edukado.

V. Esperanto en superaj lernejoj de Italujo.

La 6-an de novembro 1964 la italaj deputitoj Nicolazzi Franco (PSDI), Cariglia Antonio (PSDI), Di Vagno Giuseppe (PSI), Buzzi Carlo (DC), Borghi Luigi (DC), Zukalli Lanfranco (PSDI) prezentis oficiale kun la Nro 1816 leĝproponon ĉe la Itala Parlamento sub la titolo:

"Instruado de Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia literaturo en la superaj lernejoj".

Nia informanto S-ro Dazzini el Massa en Italujo aldonas:

"La ĉefa sukceso estas jam en la fakto, ke la prezentintoj de leĝpropono apartenas al tri diversaj partioj (Kristana Demokratio, Socialdemokrata Partio, kaj Socialista Partio). Tio signifas, ke se la esperantistoj kapablas informi pli intence kaj pli vaste inter la parlamentanoj — neniu rifuzos sian apogon por Esperanto."

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ (KKL)

Generalaĵoj kaj rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx Britujo. Anstataŭanto: S-ro Józef Toczyski, estrarano de UEA pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

Rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 2, Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo; tel. 4572.

Organizaj demandoj: S-ro P. Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraj indikoj.

PRI IDEOLOGIO KAJ ŜTATO

Rerigardo al la 8a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo



Germana Esperanto-Junularo jam la okan sinsekvajn jaron aranĝis internacian seminarion: ĉi-foje en la fortikaĵo de Nürnberg. Dum tiuj jaroj la reputacio de la Seminarioj tiel altiĝis, ke ili rajtas nomiĝi la plej grava vintra aranĝo en la Internacia Lingvo. La fortikaĵon, la vintrecon kaj la internaciecon ilustras la supra foto, kiu prezentas kvar el la gejunuloj (de dekstre Hannelore Lukesch el Germanujo, Aŝvinikumar' el Hindujo, Ibrahim Tambura el Malio kaj Michael Zeilinger, prezidanto de GEJ) kun du el la prelegintoj (fone prof. Laurat kaj dekstre prof. Lapenna).

Memorige mi citu la teknikajn faktojn, kiuj jam estas menciitaj en artikoleto de "La Juna Vivo" de ĉi-jara februaro. La 8a Internacia Seminario, kian Germana Esperanto-Junularo organizas ĉiujare ĉirkaŭ la novjar-festo, okazis ĉi-foje de la 27-12-1964 ĝis la 3-1-1965 en la fortikaĵo de Nürnberg (Germanujo), urbo kun longa esperantista historio. Tiun seminarion partoprenis 127 precipe junaj personoj el 18 landoj de Afriko, Ameriko, Azio kaj Eŭropo.

La programo de la 8a IS estis tre varia. Tamen la ĉefa afero estis — kiel kutime — la serio de prelegoj kaj la ilin-rilata diskutado. La kadra temo estis "Ideologio kaj ŝtato — reciproka influo, realaĵoj kaj mitoj", kiun la seminarianoj studis aŭskultante kaj diskutante jenajn 11 prelegojn.

Prof. d-ro Ivo Lapenna, Britujo, prezentis du referaĵojn pri la temoj "Konceptoj de ideologio kaj ŝtato" kaj "Influo de ideologio je la karaktero de ŝtato kaj juro". La preleganto proponis por la seminario uzo jenan difinon: "Ideologio estas sistemo de pensoj kaj ideoj pri ekonomia, politika kaj jura organizo de la socio kaj pri konektitaj aferoj." Poste li faris superrigardon pri la vorto- kaj nocio-historio de "ideo, ideologio" kaj pri la diversaj formoj de, kaj konceptoj pri, ŝtato kaj nacio. Li emfazis ke preferindas kompreni el "nacio" ke temas pri etna grupo, kiu, do, havas komunan tradicion kaj eventuale samajn lingvon, morojn kaj kutimojn, religion ktp. Aliaflanke, ŝtato estas karakterizebla per tri elementoj: teritorio, loĝantaro kaj publika povo.

Prof. Lucien Laurat, Francujo, en siaj du referaĵoj pri "Reciproka influado de ŝtato kaj ideologio" kaj "Kontaktoj kaj kontraŭecoj inter nacia kaj klasa ideologioj", unue, plidetaligis la karakterizon pri ŝtato, kies trioblan funkcion li konsciatis: La ŝtato estas prem-, defend- kaj administraci-organo. Plie, li per la ekzemplo de totalisma ŝtato evidentigis la emon de ideologio konkeri la kompletan vivon de la homo kaj ĝin unudirekten irigi.

Dieter Gernert, studento pri natur-sciencoj en München (Germanujo), prezentis en sia referaĵo pri "Komunaj trajtoj de la ideologioj" interesajn konfrontojn de multaj elementoj de diversaj specoj de totalisma ideologio.

Dieter Meiners, diplomita ekonomiisto en Köln (Germanujo), prelegante pri "Demokratio kaj ekonomio", prenis kiel centran problemon la ekonomian planadon, kiu estas aŭ individua aŭ ŝtata (kolektiva).

Ludwig Thalmeier, pastro katolika kaj gimnazia instruisto en Landshut (Germanujo), prezentis en sia prelego pri "Ŝtato kaj kristanismo" la katolik-eklezian ŝtato-koncepton. Grandtrajte la preleganto prezentis la tutan eklezian politikon kontraŭ la ŝtato.

D-ro Giordano Azzi, Italujo, pro grava malsano malhelpite mem partopreni, sendis sian prelego-manuskripton, kiun voĉlegis Carlo Minnaja. D-ro Azzi skizis kaj eksplikis la originojn, historion kaj doktrinon de faŝismo, kies ĉefa periodo estis inter 1918 kaj 1945, dum kiu aperis faŝismaj movadoj en ĉiuj landoj de Eŭropo, el kiuj nur la itala kaj germanaj branĉoj transprenis ŝtatan potencon.

Ivo Osibov, juristo en Split (Jugoslavio), vaste traktis la marksimon, kaj akcentis la specialaĵojn de la jugoslavia ŝtato kaj sociordo, al kiuj apartenas la pli-kaj-plia sociigo de la posedaĵoj, t.e. la transmeto de ŝtataj proprietaĵoj en la manojn de malgrandaj, ekz. fabrikaj kolektivoj.

Humphrey R. Tonkin, angla filologo en Harvard-universitato (Usono), prelegis pri la temo "Literaturo kaj ideologio" kaj traktis — limigante sian objekton — la sovetan literaturon el ideologia vidpunkto.

Edwin Thomas, Svislando, parolis sub la temo "Kelkaj aspektoj de la svisa demokratio" pri punktoj iom tro supraĵecaj kaj kutime konataj.

Juĝante la prelegaron kiel tuton, oni, malgraŭ kelklokaj misoj, povas konstati ke ili estis altnivelaj kaj tute universitatecaj. La prelegojn sekvis la kutime viglaj diskutoj, kiuj donis al la ĉeestantoj la renkonto-eblon surbaze de gravaj problemoj.

Publiko atentigita

Priseminaria informado. La publiko estis tre vaste informita antaŭ, dum kaj post la seminario: aperis en pli ol 6 gazetoj (ne nur lokaj!) sume pli ol 25 raportoj kaj atentigoj, parte kun fotoj. Nur unu artikolo en ne serioza bulvarda gazeto estis malfavora. — Ankaŭ la radio-stacio plurfoje menciis la 8an IS. La plej granda radio-sukceso certe estas la duon-hora programo pri la seminario kaj pri Esperanto en la tut-okcidenteŭropa AFN (usona armea radio). — Grave kontribuis al bona informado la publika vespero, kiun la Internacia Junular-Klubo (esperantista) de Fürth (najbara urbo de Nürnberg) aranĝis fakte modele. Estis invititaj, krom la lokaj esperantistoj kaj la seminarianoj, instruistoj kaj aliaj reprezentantoj de la kultura vivo, el kiuj partoprenis proksimume 50 personoj. Sume ĉeestis proks. 250 personoj. Antaŭ la tre konvena salonego estis starigita ekspozicio pri esperantaj libroj kaj gazetoj. Salutvortojn, kiujn lerte tradukis Hannelore Lukesch, München, parolis la estro de la loka esperantistaro, la urbestro kaj kiel reprezentantoj de la seminarianoj Aŝvinikumar', Hindujo, Ibra-

him Tambura, Malio, kaj Carlo Minnaja, Italujo. Prof. Lapenna faris mallongan paroladon pri evoluo, signifo kaj celo de la Esperanto-movado, kaj Michael Zeilinger, prezidanto de Germana Esperanto-Junularo, koncize prelegis germanlingve pri la esperantista junularo en internacia kunlaboro, ĉerpante tre lerte kelkajn ĝeneralajn punktojn el la netradukita parolado de prof. Lapenna. La tuto pasis flue kaj sen iu ĝena akcesoraĵo, kian oni tro ofte konstatas en esperantistaj aranĝoj.

Aliaj programeroj. Jam traktante eksterseminariajn kunvenojn, mi tuj diru kelkajn vortojn pri la Zamenhof-solenaĵo de la Esperanto-Grupo Nürnberg. Ĝi okazis en tre konvena salonego de la Trafikmuzeo, kaj la 90-minuta programo kun muziko, salutparoladetoj de lokaj kaj eksterlandaj reprezentantoj kaj la festparolado de prof. Lapenna estis bona. Sed — ĉar ĉio estis dirita en Esperanto, la aranĝo ne povis celi la neesperantistan publikon. Do, ĝia funkcio estis doni instigon al la loka esperantistaro per internacia aranĝo. Agnoskante tiun necescon kaj absolute ne malestimante la diversajn kontribuojn, mi tamen juĝas tian kunvenon sensenca, se samloke kaj -tempe okazas internacia esperantista kunveno kiel seminario. La lokaj esperantistoj trovas certe multe pli intensan kaj efikan instigon por sia laboro, se ili — anstataŭ solene memori la "majstron" kaj aŭskulti la movadan himnon — partoprenas en du tri prelegoj kaj diskutoj kadre de la seminaria programo, kie ili spertas la vivantan lingvon!

Krome okazis po unu akcepto fare de la ĉefurbestro de Nürnberg kaj la urbestro de Fürth, urbgvidadoj en ambaŭ urboj, prezentado de filmoj pri New York kaj Tokio kaj de lumbildoj pri la ĉi-jara kongres-urbo de Germana Esperanto-Asocio, Düsseldorf, iom laŭta novjara balo, novjarfesta promenado kaj du diskut-kunsidoj. La unua traktis la demandon "Ĉu la esperantismo estas ideologio?" kaj konkludis ke la esperantismo kiel movado celanta la enkondukon de la Internacia Lingvo kiel duan lingvon NE estas ideologio (sence de la komence menciita difino), sed ke en la Esperanto-movado ofte okazas interplekto de Esperanto kun aliaj, ideologiaj celoj. — La dua diskuto-kunsido traktis la metodon de gazetarkonferenco surbaze de la dumseminarie kolektitaj spertoj. Estas menciinde ke la aranĝantoj devas zorgi pri konvena ejo kaj kapablaj partoprenantoj; estas nepre evitende ke sin trudus iu vervulo, kiu per strangaj esprimoj kaj neĝustaj asertoj fuŝas la diskuton kun la gazetistoj — kiel okazis en Nürnberg.



Rerigardante mi opinias la 8an Internacian Seminarion bona sukceso cele al plivastigo de Esperanto por pritrakto de kulturaj k.s. aferoj. Ĝi plene plenumis sian funkcion de internacia kunven-loko ĉirkaŭ serioza diskut-temo.

Uwe Joachim Moritz

esperanto
marto 1965



RIO DE JANEIRO KVARCENT-JARA

Ne la plej granda urbo de Brazilo (tio estas São Paulo)
 nek la ĉefurbo de tiu vastega lando (tio estas Brasília)
 sed senkonteste la plej fama – tio estas Rio de Janeiro.
 En la suba artikolo prof. Mabesoone, nederlanda brazilano,
 vortigas kelkajn el la trajtoj, kiuj, kun la turist-alloga beleco,
 formas la unikan karakteron de Rio.
 Ĉi-jare ĝia popolo festas (kiel nur ĝi scias festi) la 400-an datrevenon
 de ĝia fondiĝo je la 1-a de marto 1565.

**Prof. d-ro
J. M. Mabesoone**

Brazilo, la portugallingva koloso de Latina Ameriko estas mirinda lando. Kaj ĝia plej valora juvelŝtono estas la urbo Rio de Janeiro. Tiuj, kiuj diras ke Rio estas la plej bela urbo el la mondo, vere pravas. Kvankam ne plu la ĉefurbo, ĝi tamen restas la ĉefa urbo de la lando, al kiu estas altirataj ne nur amasoj da turistoj, sed ankaŭ tiuj, kiuj serĉas laboron.

La beleco de Rio estas hela, ornama, kvazaŭ altrudiĝa, kiel reklamafiŝo. Ĉe alveno al la urbo la unuan saluton donas la famkonata "Sukerpano". Malantaŭ ĝi kuŝas la bela golfeto de Guanabara, ankaŭ unu el la plej belaj el la mondo. En la fono estas videblaj strangformaj montoj, la velforma Gavea, la dolomita * Serra dos Orgãos (Orgen-montaro), la "Fingro de Dio", la "Du Fratoj". Kaj en la antaŭa plano kuŝas la urbo, sub tropika suno, plena de blankaj konstruaĵoj. Jen la palacoj

el la imperiestra epoko, ĉirkaŭitaj de abunda tropika flaŭro. Jen, sur montetoj graciaj kapeletoj laŭ rokoka stilo. Ĉar la montoj ofte atingas la maron, la urbo dividiĝas en multaj kvartaloj. Laŭlonge de la atlanta marbordo situas la strandkvartaloj Leme, Copacabana, Ipanema kaj Leblon. En la interno ekzistas Flamengo, Laranjeiras, Tijuca kaj aliaj kvartaloj. Kaj super ĉio dominas la krutdekliva pinto de la Corcovado.

En tiu medio vivas la "cariocas" (loĝantoj de Rio), kaj kiaj ili estas, ni plej bone povas ilustrati per kelkaj rakontoj.

Sur la varma plaĝo de Copacabana sunbanas sin brunaj belulinoj. Sed, oni ne povas alproksimiĝi al ili; kaj alparoli ilin estas la plej

* Dolomito: speco de rompiĝema roko enhavanta marmoron.

granda peko, kiu ekzistas. Iu eksterlandano tamen faris tion. Li direktis sian fotilon al gracia knabino. Ŝi, ŝokita, kovris sian vizaĝon per diafana poŝtuketo. Post unu semajno ni vidis la saman eksterlandanon promeni sur la bulvarado kun sia viktimo. Ambaŭ eniris kafejon. Kelkajn tagojn poste ni renkontis ilin en la kinejo. "Nur malgranda amindumeto", eksplikis nia eksterlandano. Kaj post iom da tempo ni renkontis lin denove, edziĝinta! Amindumado ne ekzistas en Rio, la celo estas ĉiam la edziĝo. "Kion mi povus fari?" eksplikis nia eksterlanda amiko. „La tuta familio persekutis min. Ili eĉ minacis pri la polico"

Tio estas Rio de Janeiro.

"Mi devis danci"

Dum karnavala tempo la brazila prezidanto iam organizis oficialan akcepton honore al iu ambasadoro. Duonan horon tro malfrue, tiu ĉi finfine alvenis, dum la prezidanto jam kole-riĝis. Kaj ĉar la ambasadoro estis vera diplomato, li senkulpigis sin tiel, ke eĉ la prezidanto ridetis. "Via Moŝto", li diris ĉarme, "kiam mi preterpasis la ĉefstraton, mi estis tiel impresita de via karnavalo, ke mi, nu mi ne povis fari alie. Mi devis eliri el mia aŭtomobilo kaj danci la sambon kun via popolo sur la strato. Mi kredas, Via Moŝto, vi komprenas kaj pardonas."

Ankaŭ tio estas Rio de Janeiro.

Brazilanoj estas ofte rapidaj, sed ili povas esti terure malrapidaj ankaŭ. La sama dommastrino, kiu insultas sian servistinon pro ŝia flirtado, nur bedaŭras ke ŝia tagmanĝo ĉiam malfruas. Sed, se iu naive demandas: "Kial vi ne tagmanĝas ĉiutage je la unua? Ŝi respondas, "Oh, ĉi tie ne estas fabriko."

Tio okazas en Rio de Janeiro.

Por lui apartamenton vi iras al la pordisto de iu novkonstruita nubskrapulo.

"Ĉu vi povas informi min, kiom kostas tiu apartamento anoncita en la ĵurnalo?"

"Ni havas unu por 70, unu por 80, kaj unu por 90 mil kruzejoj", respondas la pordisto. "Kiel? Ĉu kelkaj situas je la fronta flanko, kaj aliaj je la malantaŭa flanko de la konstruaĵo?"

„Ne, ĉiuj estas frontaj."

"Ekzistas do ia diferenco en grandeco?"

"Ĉiuj estas samgrandaj."

"Do tial la diferenco dependas de la etaĝo."

"Ne sinjoro, ili ĉiuj troviĝas je la oka etaĝo."

"Tion mi ne komprenas. Ĉu vi povas ekspliki?"

"Sed kompreneble. La prezoj estas malsamaj, ĉar la apartamentoj apartenas al tri diversaj posedantoj."

Ankaŭ tio okazas en Rio de Janeiro.

Mia papero de naciariĝo estis subskribita de tri personoj: la Prezidanto de la Respubliko, la Ministro por Internaj Aferoj, kaj la Ĉefo de la Civila Kortego. Por ŝanĝi mian identecan karton de eksterlandano por tiu de enlandano, mi prezentis mian paperon en la koncerna oficejo. "Ĉio en ordo", diris la ju-

nulo de la ĝiĉeto, "Vi nun ankoraŭ devas legitimi la subskribojn." "Legitimi la subskribojn de la Prezidanto, la Ministro kaj la Ĉefo de la Civila Kortego?" mi demandis dube. "Jes, ĉiujn tri!" respondis la junulo ne plu rigardante min. Kaj mi iris al iu el la dekoj da oficejoj nomitaj "tabeliões". Mi eniris ĝin, kaj junulo dudekjara akceptis la subskribojn, kiel aŭtentikajn, kaj por ducent kruzejoj li uzis la stampilon. Kun la dokumento nun en ordo mi ricevis mian novan identecan karton.

Kaj ĉio tio okazas en Rio de Janeiro, kaj en la tuta Brazilo.

Mizero kunligas

Vere, preskaŭ ĉio, kio povas okazi en Rio, povas ankaŭ okazi en aliaj partoj de la lando. Malgraŭ sia unikeco, ĝi estas tipe brazila urbo. Rigardu nur la tiel nomatajn "favelas". Je la deklivoj de preskaŭ ĉiuj montetoj vi povas trovi ilin. Estas etaj kaj aĉaj domoj, krude konstruitaj, sen higienaj kondiĉoj. Tie loĝas la plej malriĉaj enloĝantoj de la urbo. "Favelas" aperas sur terenoj, kiuj apartenas al "neniu", kio signifas, ke ili apartenas al la registaro de la ŝtato aŭ de la federacio. Kuintime la kabanoj estas konstruitaj el tabuloj de kestoj kaj pecoj de malnova fero; kaj ili estas kovritaj per grandaj folioj aŭ feraj aŭ zinkaj platoj. Iliaj okupantoj estas grandaj familioj kun multaj infanoj. La viroj ne havas laboron, la infanoj ne vizitas lernejon, la familioj entute vivas je la margeno de la socio. Sed la komuna mizero estas forta ligilo, kaj fremdaj personoj prefere ne eniru tiujn kvartalojn.

En la Avenuo Rio Branco batas la dumtaga koro de Rio de Janeiro. La bulvarado havas la nomon, ne de fama militisto kiel en multaj landoj, sed de fama pacbatalanto, la barono de Rio Branco, la brazila ministro por eksteraj aferoj de antaŭ la unua mondmilito. Laŭlonge de tiu ĉi strato, kiu komenciĝas kaj finiĝas je la kurba bordo de la margolfeto, troviĝas la altaj konstruaĵoj de bankoj, komerco kaj aliaj. Aŭtomobiloj kaj aŭtobusoj preterpasas en kvar ĝis kvin vicoj. Kaj en la kafoj oni pri-traktas la plimulton de la komercaj inter-kontaktoj, konsumante grandan kvanton da "cafezinhos", etaj tasoj kun nigra, dolĉa kaj malmultekosta kafo. La viroj dominas, ofte ili blokas en grandaj grupoj la stratangulojn, diskutante kun multaj gestoj. Je la plej bela loko de la avenuo staras la moderna monumento de la knabo kiu vendas ĵurnalojn, omaĝe al malaperanta fenomeno. Krom la komerca strato, la avenuo Rio Branco estas ankaŭ la kultura strato. Tie troviĝas la urba teatro, kun preskaŭ ĉiutagaj prezentadoj de operoj aŭ teatraĵoj. Tie troviĝas ankaŭ la Belarta Muzeo kun siaj trezoroj. Sed la plej brua vivo estas nur dumtage. Post la fermiĝo de oficejoj, bankoj kaj butikoj la avenuo trapasas relative trankvilajn vesperojn.

La dumnokta koro de Rio batas en Copacabana, la luksa strandkvartalo. Laŭlonge de



La montoj Corcovado kaj Sukerpano kun la kolosa statuo de Kristo la Elaĉetinto

Rio kvarcent-jara

la marborda avenuo Atlântica defilas la junuloj kaj junulinoj laŭ bona latina kutimo. Kaj en la aliaj stratoj oni frekventas la restorciojn, la startrinkejojn, la noktajn klubojn. Priskribi la vivon tie ni ne bezonas, ĝi ja estas la sama kiel en ĉiuj metropoloj.

Nun, dum la urbo festas sian kvarjarcentan ekziston, energia registaro plibonigis kaj plibeligis multon en la urbo. Jam nun famkonata estas la parta sekigo de kurbo de la margolfeto, kie oni faris la strandon de Flamengo, duvojan aŭtoŝoseon kaj belajn ĝardenojn. Oni boris novan tunelon por plifaciligi la grandegan trafikon inter la urbocentro kaj Copacabana. Oni komencis anstataŭigi la "favelas" per higienaj, bone konstruitaj domoj. Eĉ oni atakis la problemon de la ofte mankantaj akvo kaj elektra fluo.

Aperas nova raso

La popolo mem montras miksaĵon de ĉiuj rasoj. Ili dividiĝas proksimume en 60 % da blankuloj, 30 % da mulatoj, 8 % da negroj kaj 2 % da flavhaŭtuloj. En Rio de Janeiro tamen dominas la influo de la blankuloj. Sed elementoj negraj kaj indianaj estas klare distingblaj. La homo brazila estas nur idealo. Ĝis nun la diferenco inter la diversaj popolgrupoj estas ankoraŭ tro evidenta. La konglomerato konsistas, krom el la originaj indianoj, el negroj dominantaj en la nordo de la lando, portugaloj en Rio, italoj en São Paulo, germanoj en la sudo, kaj disigitaj tra ĉiuj ŝtatoj sirianoj, grekoj kaj japanoj. Sed la mikrado daŭras, ĉar Brazilo ne konas rasan problemon. Posedi indianan sangon en la vejnoj estas honoro. Tamen, la negrojn oni ĝenerale renkontas en la servadaj profesioj.

La nova raso, kiu kelkloke jam aperas, montras certan adaptiĝon al la klimato. Oni pensus, ke la negroj el tropika Afriko ne suferus pro la varmo. Sed la afrika varmo estas seka, kaj la brazila malseka. La mulato, kontraŭe, ne suferas. La samo okazas ĉe la blankuloj. Post kelkaj generacioj, kun mikso de alia sango, ili perdas sian trosentemon por la


varmo. Kaj, kiel pruvo de la ekesto de nova brazila raso, la urbo Rio de Janeiro sentis kiel honoro, ke la "Miss Guanabara 1964" estas mulatino.

Malmultaj landoj montras pli grandan respekton por arto kaj kulturo ol Brazilo. La plej elstara ekzemplo estas la moderna arkitekturo, trovebla de la nordo ĝis la sudo. Tion la lando dankas al grupo da energiaj, relative junaj arkitektoj. Du konataj fenomenoj estas la "brise-soleils", sunŝirmiloj, kaj la "pilotis", kolonoj sur kiuj staras la konstruaĵoj. Cetere, la registaro kuraĝigas tiun novan arkitekturon. La Ministrejo de Edukado en Rio de Janeiro estas ankoraŭ konsiderata kiel unu el la plej belaj ekzemploj el la mondo. Sed, ankaŭ en aliaj aferoj la lando montras sian senton por arto. Malnovaj farmdomoj el la kolonia periodo, barok- kaj portugalstilaj preĝejoj, la skulptaĵoj de Aleijandinho, la opero "Il Guarany", poezio de Gonçalves Dias kaj Castro Alves, prozo de Machado de Assis kaj Euclides da Cunha.

Universala Kongreso ?

En Rio de Janeiro troviĝas la sidejo de la landa Esperantomovado, Brazila Esperanto-Ligo. Kun siaj pli ol 1000 membroj ĝi reprezentas grandan parton de la brazila esperantistaro. Bedaŭrinde, pro la ankoraŭ malfacilaj financaj cirkonstancoj, malmultaj personoj povas aliĝi. Sed oni havas grandan esperon por la estonteco. Laŭ invito de la urba registaro la 19-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos de la 16-a ĝis la 23-a de oktobro 1965-a en Rio, memore al la kvarjarcenta jubileo de la urbo. Kaj pluraj esperantistoj el aliaj latin-amerikaj landoj intencas viziti ĝin. Krome, laŭ instigo de la 18-a landa kongreso, okazinta en januaro 1964-a en Fortaleza (Ceará), oni eĉ pensas pri invito de la Universala Kongreso. Tio okazu baldaŭ; ne nur por montri al la tutmonda esperantistaro la belecojn de lando kaj urbo, ne nur por honori la latinamerikan Esperanto-movadon, sed ankaŭ por doni fortan antaŭenpuŝon al la enlanda movado.

Vespera panoramo de la strando Flamengo, arte kreita per parta plenigo de la margolfo




Ĉe la leganto la nomo Gronlando eble vekas imagon pri vasta insulego sub flamanta polusa lumo kaj kovrita de eterna glacio. Eble ankaŭ la nomoj de la arktaĵ famuloj Knud Rasmussen, Peter Freuchen, Fritjof Nansen kaj aliaj ekaperas en la memoro de la leganto... sed la intenco de tiu ĉi artikolo tute ne estas renovigi la aventurajn esplorvojaĝojn de la ĵus menciitaj viroj — ĝi prefere konatigu la esperantan publikon kun la nova Gronlando, kaj speciale kun la rolo de Esperanto ĉe ni.

Ekde 1953 la lando estas egalrajta parto de Danlando, al kiu ĝi ĝis tiam apartenis kiel kolonio. De tiu tempo la tuta gronlanda socio bezonis tiagradan ŝanĝon kaj evoluon, kia estas preskaŭ nekomprenebla por eksterulo. Unu el la plej gravaj rimedoj por la renovigo de la gronlanda socio estas la lerneja edukado de la junularo. Nedezirante forlasi la eskiman lingvon kaj kulturon la indiĝena loĝantaro — precipe la lerneja junularo — devas lerni la danan lingvon kiel duan gepatran. Tio estas absoluta neceso, ĉar ĉiuj lernolibroj estas la samaj kiel en la cetera Danlando, kaj la eventuala sekvanta metia edukado ankaŭ necesigas la konon de la dana. Nun oni pripensu la diferencon inter la eskima kaj la dana — ĝi estas same granda kiel inter iu ajn eŭropa lingvo kaj la ĉina — se oni flankenlasas la ĉinajn literojn!

Do la nura lernado de la dana kiel dua gepatra lingvo estas por si mem tre energikaj talentbezona entrepreno. Sed por ke nia mezgrada ekzameno estu samvalora kiel la dana kaj por ke la lernantoj havu la ŝancon akiri gimnazian aŭ universitatan klerigon en Danlando, nia instruplano ampleksas ankaŭ la anglan kaj la germanan lingvon. Kompreneble la intenco de la koncerna aŭtoritato estas la plej bona... sed ĝi ne sufiĉe konsideras la limigitan lernkapablon de eĉ talenta junulo. Tial ni ĉiutage devas konstati, ke la lernado de lingvoj (precipe la germana!) estas la plej granda problemo de niaj junuloj. Ĉiu lingva ekzameno denove malkovras malpli bonan rezulton ol en samnivela klaso en dana lernejo. La lingva frenezaĵo aperas pli evidente, se oni scias, ke la plej multaj el la junuloj ekhavas postenon en Gronlando, sen bezono por aŭ la angla aŭ la germana.

La ekscion pri Esperanto akompanis granda intereso kaj entuziasmo inter la mezgradaj lernantoj. Sed laŭ la nunaj lernejaĵoj Esperanto estas nur instruebla kiel libervola fako ekster la ordinara leciontabelo. La plej lasta propono enkonduki Esperanton kiel elektoblan fakon anstataŭ la germana ŝajnas veki intereson ĉe pluraj niaj lernejestraroj, sed la konsidero al la egaleco de Gronlando kaj Danlando kaj la ĉie ajn troveblaj kontraŭuloj de Esperanto malfaciligas la ĉirilatajn klopodojn.

La resto de tiu ĉi artikolo estu insista peto pri helpo — la peto estu direktita al koncer-



Aspekto de Godthåb

naj kompetentuloj, kaj jen la kaŭzo por la peto: ĉi-jare la nunaj gronlandaj lernejaĵoj estos ŝanĝitaj laŭ la postuloj de la moderna epoko. Sed la lerneja spirito estas konservema, kaj tial la vekiganta interesiĝo pri Esperanto ĉe la gronlanda lernejestraro bezonas stimulon de aliaj lernejestraroj, en kies lernejoj Esperanto jam estas rezultplena fakto. La novzelanda ekzemplo estas vere imitinda, kaj gratulo pro la konsiderata rolo de Esperanto en nia mezgrada lernejo certe estus dezirinda stimulilo.

Ankaŭ alimaniere ekzistas eblecoj por subteni la ĉi-lokajn poresperantajn klopodojn. Troviĝas certe ĉie en la mondo intereso pri diversspecaj cirkonstancoj en la nuna Gronlando. La tuta gronlanda administracio kaj ĉiuj opiniformigaj instancoj koncentriĝas en Godthåb, la ĉefurbeto de la lando loĝiganta ĉirkaŭ 4000 homojn. Sendube okaza esperantlingva informpeta sinturno de aŭtoritatanoj, diversmetiaj kompetentuloj k.t.p. al niaj opiniformigaj instancoj kreus komprenon por la neceso de nia lingvo.

Venontsomere la tutlanda konsilantaro interalie decidis pri la sorto de Esperanto en nia lernejo...! Finfine listo de lokaj adresoj, al kiuj skribaj sinturnoj estus utilaj por akceli la esperantigan rezulton ĉi-lande:

1. N. O. Christensen, estro de Gronlando.
2. Frederik Nielsen, estro de la gronlanda radio.
3. Jørgen Fleischer, redaktoro de la gronlanda gazeto.
4. Mads Lidegaard, ĉefpastro en Gronlando.
5. Chr. Berthelsen, direktoro de publika instruado.
6. Jørgen Hertling, poliestro de Gronlando.
7. Viggo Bech, distrikta kuracisto.
8. Marius Abelsen, estro de la kleriga konsilantaro.

NOVA GRAVA DOKUMENTO DE CED

Konforme al la plano por la Jaro de Internacia Kunlaboro, CED ĵus publikigis la dokumenton CED/7 sub la titolo Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto). La dokumento estas verkita laŭ la modelo de la siatempaj dokumentoj CED/5 kaj CED/4, sed estas aldonitaj 2-3 novaj mallongaj ĉapitroj kaj la tuta materialo estas rearanĝita kaj ĝisdatigita. La dokumento konsistas el kelkaj citaĵoj Anstataŭ Antaŭparolo kaj el jenaj 14 mallongaj partoj: Enkonduko, Formiĝo, Ekesto kaj Evoluo de la Internacia Lingvo, Socia Bazo, Internacieco, Opinioj pri la Valoro kaj Signifo de Esperanto, Instruado, Literaturo, Scienco kaj Tekniko, Fakaj Vortaroj kaj Terminaroj, Gazetoj kaj Revuoj, Esperanto-Organizaĵoj, Praktikaj Aplikoj kaj Aliaj Aspektoj, Kelkaj Gravaj Rekonoj, Propono al UN.

La dokumentoj de CED en tiu ĉi serio, precipe CED/5, havis siatempe grandan efikon. Ili aperis en multaj nacilingvaj tradukoj kaj estis utiligataj por diversaj celoj, precipe por dokumentado antaŭ internaciaj kaj naciaj instancoj. La nunan dokumenton CED/7 CED publikigas en Esperanto kaj en la angla. La Esperanto-eldonon ricevos ĉiuj regulaj abonantoj de la Esperantlingva eldono de la CED-dokumentoj kaj ĉiuj landaj asocioj. La angla eldono aperos en sufiĉa kvanto por kontentigi la bezonojn de CED mem kaj de la organizaĵoj en la angle parolantaj landoj. Tuj post la apero de la angla eldono la Esperanto-organizaĵoj en tiuj landoj estos informitaj, tiel ke ili povos mendi la bezonatajn kvantojn de la C.O. de UEA laŭ la prezo, kiu respondos al la kostoj de publikigo.

CED varme rekomendas al aliaj landaj asocioj prizorgi la tradukon kaj publikigon en la respektivaj naciaj lingvoj kaj distribui tiun eldonaĵon kiel eble plej vaste en la Jaro de Internacia Kunlaboro.

U.E.A. EN UNESKO-DOKUMENTOJ

La periodaĵoj de UNESKO sufiĉe ofte enhavas informojn pri UEA aŭ Esperanto. Pri tio CED jam plurfoje raportis en tiu ĉi rubriko. Okaze de la 13-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Parizo fine de 1964, konciza resumo pri la kunlaborado de UEA kun UNESKO en la lasta 6-jara periodo estas publikigita sur la pp. 116 kaj 117 de la Dokumento de UNESKO 13C/PRG/31 de la 24-a de julio 1964. Ĉar en tiu resumo troviĝis pluraj eraroj pri faktoj, la Sekretariato de UNESKO publikigis, laŭ la peto de la prezidanto de UEA, dupaĝan korekton en la dokumento 13C/PRG/31 Corr. de la 20-a de novembro 1964. UEA estas plue menciita en la dokumento 13C/PRG/21 de la 24-a de julio 1964.

RIMARKOJ DE UEA en DOKUMENTO DE UN

En ligo kun la preparata programo por la Internacia Jaro de Homaj Rajtoj UEA sendis siatempe al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj nombron da sugestoj. Konciza informo pri la starpunkto de UEA aperis sur la p. 31 de la dokumento de UN ST/SG/AC.5/4 de la 21-a de septembro 1964.

Estas menciinde ke la periodaĵo "Secretariat News" de la 15-a de januaro 1965 publikigis sufiĉe longan artikolon sub la titolo "UNESCO-Esperanto" okaze de la 10-a datreveno de la Rezolucio de UNESKO de la 10-a de decembro 1954. En la n-ro de la 29-a de januaro de la sama periodaĵo aperis informo pri la UN-Esperanto-Klubo, ĝiaj regulaj merkredaj kunvenoj kaj la nova kurso de Esperanto por la geoficistoj de UN, kiun gvidos s-ro Mark Starr.

UEA EN INTERNACIA KONFERENCO

En la ĝenerala asembleo de la Unio de Internaciaj Asocioj (Bruselo, nov. 1964), al kiu apartenas UEA, la Asocion reprezentis kiel observanto s-ro Wim De Smet, komisiite de la prezidanto de UEA, estrarano pri eksteraj rilatoj.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 1-a de decembro . . .	193-	7-	4
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro Bouvier, Svislando	2-	1-	8
S-ro Prof. J. Régulo Pérez, Kanarioj . . .	1-	2-	6
S-ro Teodor Jelenc, Francujo	0-	4-	0

La stato je la 31-a de decembro 1964 202-15- 6

Ĉijare la donacoj al CED estis konsiderinde pli altaj ol en la pasinta jaro. Tio estas ne nur financa helpo, sed ankaŭ kuraĝiga subteno al la laboro de CED. CED tutkore dankas al ĉiuj donacintoj, aparte al tiuj, kiuj regule, ĉiujare, kontribuas laŭ siaj eblecoj. En tiu ĉi jaro specialan dankon al s-ro E. F. Dean, Britujo, s-ro Nassif Isaac, Kuwait, kaj s-ino E. M. Shaw, Novzelando, pro ilia granda financa helpo.

Donacoj por CED en 1965

	£	ŝ	p
Donaco N.N. Usono	1-	10-	0
S-ro D-ro G. Maillard, Francujo	0-	14-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ino R. Seddon, Britujo	2-	0-	0
F-ino Lemonier, Francujo	1-	0-	0

La stato je la 31-a de januaro . . . 10- 4- 0

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

FARIĜU ABONANTO DE LA
DOKUMENTOJ DE CED EN LA
INTERNACIA LINGVO: 5,50
GULDENOJ JARE (22 STELOJ)

Soifo, versaĵoj de Lajos TÁRKONY. Eld. Stafeto, La Laguna 1964. Kun antaŭparolo de K. KALOCSAY. 231 p. 22 × 16 cm. Prezo: 9,10 gld (36,4 st).*

Lajos Tárkony estas hungaro, naskita en 1902, kiu debutis antaŭ 40 jaroj en "Literatura Mondo" kaj baldaŭ famiĝis kiel artikolisto, tradukisto kaj poeto. Serio de liaj literaturaj eseoj aperis en 1932 sub la titolo *De paĝo al paĝo*. Alia libro lia, *Vojaĝo en Faremidon*, tradukitaj noveloj, publikiĝis du jarojn poste. Al la fama *Hungara Antologio* (1933) li eminente kontribuis. La antologieto *Dekdu poetoj* (1934) prezentis indan kolekton de liaj originalaj poemoj. Sed estas nur nun per la libro *Soifo*, ke liaj originalaj poemoj, dise aperintaj en gazetoj kaj revuoj tra la jaroj, estas kolektitaj en unu volumon, kiun Auld en sia *Antologio* elkatedris "unu el la ĉefaj libroj, kiuj ankoraŭ mankas al ni".


La poezio de Tárkony estas dividebla en kvar periodojn. La unua entenas la poemojn aperintajn en *Dekdu poetoj* — kolorbildojn nuancitajn triste. La dua ampleksas la antaŭkaj dummilitajn jarojn, kiam certa malstreĉiĝo de formo estas konstatebla paralele kun kreskanta enmemiĝo de la poeto. La tria periodo komenciĝas per 1945 kun reveno al la fiksfarmaj poemoj kaj plia atento al la ĉirkaŭa mondo. La kvara periodo kaj la plej nova montras formon eĉ pli strikte fiksan; aparte rimarkinde estas, kiel similaj estas etose la poemoj de tiu lasta periodo al tiuj de la unua, kio montras tratenan sentunuecon de la poeto.

Sur la faldoklapo de la libro estas legeble, ke "aserti, ke Lajos Tárkony estas poeto, signifas preskaŭ kulpi pleonasmon". Sed kia poeto? Persone mi devas konfesi, ke multo

en la poezio de Tárkony ne entuziasmigas min. Lia sindona kulto de la striktaj versformoj tudas min facile, versaĵne pro tio, ke mi tie kredas vidi unu el la ĉefaj kaŭzoj de lia pasio por la sonaj miraĝoj, sed per ĉi tiu termino mi aludas al tiuj vortoj, frazpartoj kaj frazoj, kiuj apenaŭ ion konsiderindan aldonas al la traktata temo, sed estas uzataj precipe pro aŭ metrika postulo aŭ "belsoneco". Ke la poeto ne alte sukcesas en la ciklo *Nek verso nek prozo*, kiu la sola ĉe Tárkony montras evidentan malstreĉiĝon de formo, tamen, laŭ mi, ne ŝuldiĝas al la forlaso de la strikto kiel opinias Kalocsay, sed al tio, ke ne konformas al la genio de Tárkony verki sengarnaĵe, nudesprime. Kiel poeto li estas esence ornamisto, sonoremulo, kio tamen ne devas rabi de li la merititan epiteton "vera". Tárkony estas romantika poeto (kaj "polurita" se ni deziras la epiteton!). Tion pruvas pli ol multo alia la rifuĝema spirito de la dummilitaj poemoj. Aŭ ĉu eble la vorto "rifuĝema" estas maltaŭga ĉi tie? Supozeble estas necesaj pli da kuraĝo, pli da sinrego por tiel verki pri la naturo kaj pri la amo, por "subtile kanti" en tiaj tempoj, ol komenti krude pri la pafoj kaj la pendigiloj.

Kvazaŭfine (ĉar mi sentas la kompatindon de tiuj malmultaj vortoj fronte al la poeta staturo de Tárkony): poezio lia estas mal-egala, sed al mi ĉiam simpatia. Laŭ mia opinio lia arto plej alte atingas en iuj el la sonetoj lastparte de la libro, kie senca kompaktio plenigas kontentige la elegantan formon. Ĝenerala trarigardo de la tuta Tárkony nepre kondukas la leganton al la justa konkludo, ke ja temas pri unu el la plej gravaj poeziaj verkoj en Esperanto ĝis nun.

Baldur Ragnarsson (Reykjavík)



Lajos Tárkony

La novaj vestoj de la imperiestro kaj du aliaj fabeloj de H. C. ANDERSEN. El la dana tr. Ib SCHLEICHER. Eld. Koko, Kopenhago, 1964. 51 p. 27 × 21 cm., kolorilustrita, bindita. Prezo: 7,50 gld. (30 st).*

Dekomence nia literaturo proprigis al si la vundite-mokemajn, naive-saĝajn rakontojn de H. C. Andersen, sed nur en sia nuna matureco ĝi komencis briligi kaj elmontri ilin per indaj enkadrigoj. En ĉi tiu nova volumo, forme frata al la "Marvirineto", la moderna bindo, grandaj kolorilustraĵoj — sprite kaj ĝisdetale karikaturnaj — kaj bona grafika aranĝo kune atingas nivelon plene adekvatan al la enhavo. Aparte plaĉas, ke la ilustrinto Hjortlund sciis rekapti iagrade la duvaloran, groteskan spiriton de la verkisto.

Por konantoj de la Andersen-verkaro menciindas, ke la "du aliaj fabeloj" estas "Hans-fuŝulo" kaj "Estas tute certe!". La novaj tradukoj de Schleicher flue redonas tiun facile rekoneblan — eĉ en traduko — improvizaspektan stilon: "Tiuj du nun preparis sin dum ok

tagoj, tio estis la plej longa tempo, kiun ili havis por tio, sed ankaŭ sufiĉis, ĉar ili havis antaŭsciojn, kaj tiaj estas utilaj" ... k.s. Stilo ne ĉiam simpla, sed daŭre amuza.

V. Sadler

Vinjeto el "La novaj vestoj"



esperanto
marto 1965

recenzoj

Norvega bibliografio, de Lars Kåre HUNNES. Eld. Norvega E-ista Ligo. Oslo, 1964. 39 p. 21 × 15 cm., multobligita. 1,30 gld.*

Jen bonvena paralelo al la bibliografioj pri dana tradukita belliteraturo (Poul Thorsen, 1952; Sv. Dragsted, 1962). Kiel ili ĝi estas aranĝita alfabete laŭ aŭtoroj, kaj kiel ĉe Thorsen la kompilinto indikis ankaŭ la tradukintojn, kaj eĉ, tre laŭdinde, li indikis naskiĝjaron, event. mortojaron kaj la profesion de ĉiuj aŭtoroj kaj tradukintoj. Entute ĉ. 400 eroj. Koncize: modela aranĝo; nepre akirenda al E.-bibliotekoj; nepre imitinda por aliaj landoj aŭ lingvoregionoj.

Paul Neergaard (Kopenhago)

Kial Ĥruščov falis. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1964. 11 p. 18 × 13 cm. 0,15 gld.*

Resumo: La aŭtoroj resume prezentas 12 malbonojn jam pli detale atribuitaj al Ĥ. en diversaj broŝuroj de 1963 kaj 1964.

La turo inter nuboj, dramo pri Sankta Barbara, de Jan kaj Karel FILIP. Eld. IKUE, Nederlando, 1964. Serio Kristana Kulturo n-ro 4. 96 p. 19 × 12 cm. Prezo: 3,50 gld. (14 st).*

Terminaro de kemiaj afiksoj, de Jan PIÓRO. Dua eld., la aŭtoro, Str. Reja 3/19, Piastow ĉe Varsovio, Pollando. 1965. 57 p. 21 × 15 cm., hektografita. Klarigoj en Eo.

Prononcado de Esperanto, kun unua ĉapitro el "Privilegia Vojo". Disko 17 cm., 45 t.m., duflanka. Parolas Sirkka GUSTAFSSON kaj Vilho SETÄLÄ. Eld. E-Instituto de Finnlando. Prezo: 6,— gld.*

Historio de Esperanto (Movado kaj Literaturo) 1887-1960, de Léon COURTINAT. Eld. la aŭtoro, Francujo, 1964. Unua volumo, 1887-1913: 396 p. 24 × 16 cm., ilustrita.*

Raciaj derivoj kaj verbuzoj, de Emilo GASSE. Eld. la aŭtoro, Francujo, 1964. 8 p. 21 × 14 cm.

20 ème Congrès International de la Jeunesse Espérantiste. Eld. 20-a IJK, Kastelenstr. 231, Amsterdam-Z., 1964. 36 p. 23 × 17 cm., ilustrita. Francilingva raporto.

Leteroj el Sud-Vjetnamio, dua volumo. Diversaj aŭtoroj. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964. 213 p. 19 × 13 cm., ilustrita.*

Resumo: Ĉi tiu dua volumo de "Leteroj el Sudvjetnamio" sekvas nelonge post la unua. Kompare kun tiu, ĝi estas jam videble pli ampleksa, kaj ilustrita per 8 paĝoj da fotoj pri la okazaĵoj en la lando. Ankaŭ kompare kun la unua volumo, ĝiaj 28 leteroj ampleksas pli aktualan periodon: de oktobro 62 ĝis decembro de 1963. Direktite al konatoj kaj parencoj loĝantaj en Norda Vjetnamio, ili plejparte rakontas pri la kruelaĵoj de la malamiko kaj pri la gerilaj sukcesoj.

Perspektivoj, de F. LELOTTE. El la franca tr. Leotado DE RUYVER. Eld. Fratoj de l'Karito, Belgujo, 1963. 57 p. 19 × 13 cm. Katolika. 0,80 gld. (3,2 st).*

Resumo: La aŭtoro instigas, ke oni sin malfermu al la vivo, al homaj (individuaĵoj kaj sociaj) problemoj, al Kristo kaj al la eklezia vivo, kaj speciale traktas la sintenon de katolikoj al sciencaj progresoj.

Vortareto kun ekzemploj (en Esperanto kaj japana), de Rihej NOMURA. Eld. Pirato, Osaka, 1964. 106 p. 15 × 10 cm.*

H. C. Andersen, la fama fabelverkisto, biografia kompilaĵo de Gösta HENDRIKSSON. Eld. la aŭtoro, Mogensgatan 3, Malmö S, Svedujo. 8 p. 30 × 21 cm., multobligita. Prezo: 2 rpk. afrankita.

La espero kaj La tagiĝo. Kantas ĥorgrupo Nagoya. Fleksebla disko 33¹/₃ t/m., 17 cm. diam. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, 1964. Kun tekstoj kaj muziknotoj. 1,50 gld (6 st).*

La amata voĉo de d-ro H. Jagi, kun voĉo de d-ro I. Arata. Fleksebla disko 33¹/₃ t/m., 17 cm. diam. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, 1964. Kun tekstoj. 1,50 gld. (6 st).*

Mekanismo, kurso fundamenta, de K. OSSAKA kaj S. TAKATA. Eld. Japanujo, 1963. 260 p. 21 × 15 cm. Japanlingva kun indekso esperantlingva.

ricevitaj eldonadoj

* Ricevebla ĉe UEA

nekrologoj



Pastro Halldór Kolbeins

ARTHUR MAURICE HYDE (1891-1965)

Mortis en Queensland, Aŭstralio, la 14-an de januaro, s-ro A. M. Hyde, prezidinto de Aŭstralio E-Asocio. Li verkis lernolibron eldonitan en 1918, kaj aliajn verkojn publikigis sub pseŭdonomo Antoni Delsudo, i.a. la libron "Aŭstralio, lando kaj popolo". Li estis la unua redaktoro de "La suda kruco", nun aperanta sub la titolo "Australian Esperantist". Ĉe la funebra ceremonio la delegito de UEA por Brisbane parolis nome de AEA, UEA kaj aliaj organizaĵoj.

FRIESO MOOLENAAR

La 23-an de januaro mortis Frieso Moolenaar, el Groningen, Nederlando, komponinto de la melodio de "La vojo". Tiu melodio estas la finkanto de kompleta kantato "El la vivo de Zamenhof".

La apuda bildo estas portreto de la forpasinta pastro Halldór Kolbeins ("Esp." jan. p.13). Li estis konata tra tuta Islando kiel eminenta predikanto kaj oratoro. Lian enterigon ĉeestis i.a. la prezidanto de Islando, ministroj kaj episkopoj.

LAŬLANDE

Kongo

● Konga E-Instituto organizas grandan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj (de infanoj 6- ĝis 15-jaraj) komence de septembro. Ĉiu sendinto ricevos poŝtmarkojn aŭ jarabonon al "Afrika Revuo", laŭprefere. Adreso: B.P. 7579, Leopoldville 1.

Svedujo

● Ni salutas la 70-jaran datrevenon de la persiste agema literaturisto d-ro Ferenc Szilágyi, kies konata ido "Norda Prismo" estas mem jam pli ol 10-jara.

Usono

● Mallonga letero publikigita en gazeto "This Week" rezultigis 8000 petojn pri informoj al la Esperanta Informa Centro en Nov-Jorko. Pliaj 2000 petoj alvenis pro alia artikolo distribuita per United Press.

LAŬFAKE

Geografio

● De la 18-a ĝis la 25-a de julio 1965 okazos la 5-a Internacia Geografia Semajno — en montara regiono de Pollando. Detalojn pri la programo (ekskursoj, prelegoj, filmoj) kaj aliĝo sendas: I.G.S., Jelenia Góra, str. 1 Maja 51/52, Pollando.

Kemio

● Post zorga planado, Urugvaja E-Societo decidis eldoni la unuan pure natursciencan revuon en la historio de la Internacia Lingvo: KEMIO INTERNACIA, pri kemio kaj rilataj

fakoj. La eldonantoj finance garantias la revuon por 1965. Ĝi aperos presita, en formato 23 × 17 cm., kun amplekso de 160 paĝoj jare. Oni petas kunlaboron de ĉiuj kemiistoj, kaj helpon de ĉiuj interesitoj por distribuado, varbado de anoncoj ktp. Jarabono: 1 us. dol. aŭ 3,60 gld., pagebla per UEA. Adreso por kunlaboro: Casilla de Correo 1040, Montevideo, Urugvajo.

Literaturo

● Literatura revuo "Sin Nihon Bungaku" (Kawazoecho 37, Nakano-ku, Tokio, Japanujo) enketas pri la scio en eksterlando pri japana literaturo. Ĉiujn, kiuj skribos al ĝi pri siaj opinioj ricevitaj per legado de japana literaturo en traduko, la revuo rekompencos per donaceto, se la letero meritis publikigon.

Radio

● IKUE alvokas ĉiujn katolikojn skribe peti de la Papo, ke la Vatikana Radio enkonduku ankaŭ esperantajn elsendojn. Leteroj estu adresitaj al la Papo, sed senditaj al Resp. P. H. Jacobitti, Piazza S. M. Maggiore 8, Romo.

Turismo

● La "Internacia Akademio de la Turismo", kunveninta lastatempe en Svislando, komisiis d-ron H. Unger el Zürich — membron de TEJA — enketi kaj raporti pri la praktika uzado de Esperanto en turismo, kaj prezenti proponon pri eventuala adopto de Esperanto en la Internacia Faka Vortaro de tiu Akademio.

mallongaj novaĵoj

50-a UNIVERSALA

KONGRESO DE ESPERANTO

Tokio, 31.VII - 7.VIII. 1965

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata, Prezidanto de la Japana Akademio.

OFICIALA KOMUNIKO

N. 7 Rotterdam, la 10-an de feb. 1965

Teatra Prezento:

Dum la Universala Kongreso okazos teatra prezento fare de la "Teatro Populara" el Łódź (Pollando). Prezenta estos la konata dramo de la uzona verkisto Shimon Vincenberg "Kataki signifas malamikon".

Foto-Konkurso:

Ni atentigas la interesigantojn ke la juĝkomisiono akceptos konkursaĵojn ĝis la 1-a de julio 1965. Por eviti altajn kostojn pro aerpoŝta sendo, estas konsilinde sendi la fotojn por la Konkurso per surfaca poŝto, kalkulante ke en tiu kazo necesas ĝis 60 tagoj.

Ni samtempe memorigas pri la riĉaj premioj je dispono de la gajnintoj, kiuj konsistas el 210,— ned. gld. plus 1 foto-aparato kaj 3 projekciiloj por lumbildoj. La foto-aparato kaj la projekciiloj estas afable disponigitaj de la konata japana fabriko FUJI.

Detaloj pri la Konkurso troviĝas en la Dua Bulteno kaj en la novembra eldono (1964) de la revuo "Esperanto".

Ekspursoj; Grava atentigo:

Kontraŭe al supozo de multaj, estos ja eble partopreni kaj la tuttagan ekspurson de 8.8 kaj la postkongresan ekspurson. Pliaj detaloj en venonta komuniko.

Kotizoj:

Post la 31-a de marto la aliĝkotizoj estos:

Kongresano	60,— gld. (240 st.)
Edz(in)o de kongr.	30,— „ (120 st.)
Junulo malpli ol 20-jara	23,— „ (92 st.)
Univ. Studento de 20-30 jaroj	37,— „ (148 st.)
Blindulo	30,— „ (120 st.)

Postkongreso:

La partoprenantoj havos la okazon viziti i.a. fabrikon por elektro-aparatoj kaj viskio-fabrikon.

Statistiko (ĝis 10.2.1965):

Alĝ. 1; Arg. 4; Aŭstral 23; Aŭstru. 8; Bah. Ins. 2; Belg. 7; Braz. 9; Brit. 43; Bulg. 11; C.A.R. 1; Ĉeĥ. 1; Danl. 16; Finnl. 6; Franc. 92; Germ. 41; Hind. 1; Hisp. 7; Hong-Kong 2; Hung. 7; Isl. 1; Isr. 2; Ital. 30; Japanujo 722; Jug. 10; Kameruno 2; Kanado 6; Maroko 2; Meksiko 2; Monako 2; Ned. 32; Norv. 11; Nov.Zel. 12; Poll. 25; Portug. 1; Rum. 1; Sov. 1; Sved. 47; Svisl. 12; Urugvajo 4; U.A.R. 1; Usono 45; Venezuelo 3.

Entute 1250 el 42 landoj.

G. G. Pompilio


Konstanta Kongresa Sekretario



esperant
marto 196

LA KONGRESEJO EN TOKIO

Jen unu el la modele klimatizitaj kaj akustike taŭgigitaj kunvenejoj de la granda konstruaĵo Shin Nokyo Kaikan.



EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO

Vieno, 11-17 julio 1965

Fakajn kunvenojn anoncis ISAE, ILEF, ESLI, ISAKE, eŭropfederalistoj, eldonistoj, k.a.

Filmo esperantlingva "Per aŭtobuso trans la Alpoj de Grossglockner", estas preparata de la poŝta administrejo, kaj estos luebla de lokaj grupoj.

Magnetofona bendo kun programo pri la Eŭropa Esperanto-Konferenco estas senpage ricevebla el Vieno por lokaj grupoj.

Prelegos en la kadro de la Konferenco i.a. la konata pianisto s-ro F. Merrick el Londono kaj prof. Laurat el Parizo.

Prospektojn eldonas okaze de la Konferenco jam 5 diversaj instancoj turismaj k.a.

Aliĝilo kaj mendilo por loĝado estis enmetita en la decembra "Esperanto". Pliaj aliĝiloj kaj informiloj estas riceveblaj de la EEK, Fünfhausgasse 16, WIEN XV, Aŭstrujo.

LAŬLANDA MEMBRO

Lando	AM	MJ	MA	MS	P	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	kune
Adeno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Alĝerio	—	—	5	—	—	—	—	—	—	—	5
Angolo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Antiloj	—	—	3	—	—	—	—	—	—	—	3
Argentino	300	—	42	—	—	11	—	—	3	1	357
Aŭstralio	133	13	96	5	—	19	—	1	4	1	272
Aŭstrujo	200	17	75	1	—	6	3	—	3	1	306
Bahamoj	—	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Belgujo	475	20	106	5	—	10	1	—	1	—	618
Bolivio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1	2
Brazilo	816	28	169	41	—	33	1	2	3	1	1094
Britujo	748	86	371	44	—	72	3	5	26	12	1367
Bulgarujo	4525	14	161	—	—	5	—	—	13	1	4719
Cejlono	—	—	2	—	—	2	—	—	—	—	4
Centra Afr. R.	—	—	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Cipro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Ĉeĥoslovakujo	—	3	94	—	—	4	1	—	1	—	103
Ĉilio	—	—	1	—	—	1	—	—	—	—	2
Ĉinujo	—	—	12	1	—	—	—	—	—	—	13
Danlando	819	31	139	20	—	8	—	—	3	1	1021
Ebura Bordo	—	1	2	—	—	—	—	—	—	—	3
Egiptujo	—	—	1	—	—	1	—	—	—	—	2
Ekvadoro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Etiopio	—	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Finnlando	—	47	190	8	—	10	1	4	7	3	270
Francujo	1394	96	435	25	—	50	7	4	21	8	2040
Ganao	—	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Germanujo	1896	66	361	31	—	34	1	4	10	10	2413
Grekujo	—	—	13	—	—	—	—	—	—	—	13
Gvatemalo	—	—	2	—	—	—	—	—	—	—	2
Hindujo	—	—	8	—	—	—	—	—	—	—	8
Hispanujo	469	21	201	6	—	11	—	—	9	4	721
Hongkongo	—	—	1	—	—	1	—	—	—	—	2
Hungarujo	3300	1	72	—	—	—	3	—	5	1	3382
Indonezio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Irano	—	—	—	—	—	2	—	—	—	—	2
Irlando	—	—	4	—	—	1	—	1	1	—	7
Islando	—	1	19	1	—	3	—	—	—	—	24
Israelo	160	3	23	—	—	4	—	—	—	—	190
Italujo	1002	33	244	8	—	6	1	—	5	11	1310
Japanujo	1200	9	214	—	—	4	1	—	14	12	1454
Jugoslavio	1500	21	132	3	—	12	—	1	25	9	1703

esperanto
marto 1965

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj dum la venontaj monatoj:

1. *Plani la informan agadon* por la Jaro de Internacia Kunlaboro per speciala komitata aŭ plena kunveno, kaj disdividi la konkretajn taskojn inter la grupanoj. Aparte atenti la rilatojn kun la gazetaro. (Vidu p. 42)

2. *Kolekti informojn* pri la diversaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj de 1965, kaj raporti al la grupanoj pri la plej interesaj kaj oportune viziteblaj. Grupanoj, kiuj partoprenis similajn aranĝojn en antaŭaj jaroj, povas kontribui proprajn impresojn kaj rekomendojn. (Vidu p. 36, februara "Esperanto"). La persono komisiita por la preparo de tia klubvespero bone zorgu, ke ĉiuj necesaj informoj, antaŭ ĉio detalaj vojaĝkostoj, estu disponeblaj.

3. *Sendi komunan salutleteron* en Esperanto al iu alilanda instanco, kongreso, aŭ simila:

ekzemple gratule al la estro de la ŝtato Guanabara, Brazilo (simpatianto de la Internacia Lingvo), okaze de la 400-jara festo de Rio de Janeiro. Adreso: Governador Carlos Lacerda, Palácio Guanabara, Rio de Janeiro, Brazilo. (Vidu p. 48)

4. *Iniciati ĝemeligon de sia urbo* kun urbo alilanda, eventuale samkarakterata. La Jaro de Internacia Kunlaboro donas tre taŭgan motivojn por tia ĝemeligo, kaj la unuaj esploroj estas facile fareblaj per la delegita reto de UEA.

5. *Komune diskuti* la kampanjon por kolekti subskribojn por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj; precipe interŝanĝi spertojn pri varbado de subskriboj, kaj sugestojn pri gravaj personoj kontakteblaj pri la kampanjo. (Vidu p. 43)

Se vi havas utilajn sugestojn por ĉi tiu rubriko, sendu ilin al la redaktoro.

STATISTIKO 1964

Lando	AM	MJ	MA	MS	P	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	kune
Kanado	117	5	41	8	—	4	—	—	2	1	178
Kenjo	—	—	1	—	—	1	—	—	—	1	3
Kolombio	—	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kongo (Brazza.)	—	1	—	2	—	—	—	—	—	—	3
Kongo (Leopold.)	—	—	2	—	—	—	—	—	—	—	2
Koreujo	—	—	11	—	—	—	—	—	1	3	15
Kostariko	—	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Kubo	—	—	2	—	—	1	—	—	—	—	3
Kuvajto	—	—	1	—	—	1	—	—	—	—	2
Libio	—	—	—	—	—	—	—	1	—	—	1
Luksemburgo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Madagaskaro	16	1	9	—	—	—	—	3	3	1	33
Makao	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Malio	—	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Malto	—	—	2	—	—	—	—	—	—	—	2
Maroko	—	—	3	—	—	2	—	—	—	—	5
Meksiko	—	1	13	—	—	3	—	—	—	—	17
Monako	20	1	5	—	—	—	—	—	—	—	26
Mozambiko	—	—	4	—	—	—	—	—	—	—	4
Nederlando	786	71	346	19	—	58	4	2	9	4	1299
Nigerio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Norvegujo	495	9	85	4	—	13	1	2	—	4	613
Novzelando	185	29	77	5	—	21	—	—	1	1	319
Pakistano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Pollando	3100	2	269	—	—	2	—	—	10	9	3392
Portoriko	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Portugalujo	—	1	33	3	—	3	3	—	—	—	43
Rodezio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Rumanujo	—	1	5	—	—	—	—	—	—	—	6
Solomonoj	—	—	1	1	—	—	—	—	—	—	2
Sovetunio	—	1	79	3	—	1	—	—	1	1	86
Sudaŝtato	—	1	10	2	—	5	—	—	—	—	18
Svazilando	—	1	—	—	—	—	—	—	—	—	1
Svedujo	1000	116	332	77	—	33	—	3	8	4	1573
Svislando	100	94	111	8	—	46	1	2	1	—	363
Tajlando	—	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Tunezio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Turkujo	—	—	3	—	—	—	—	—	—	—	3
Urugvajo	50	1	7	—	—	1	1	—	—	—	60
Usono	242	35	256	34	—	44	2	4	18	14	649
Venezuelo	—	—	14	—	—	—	—	—	—	—	14
83 landoj	25048	882	4933	367	1	553	35	39	209	120	32187

esperanto
marto 1965



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando.

AKTIVEGO EN TEJO

El la komisionoj, elektitaj dum la 20-a IJK en Amsterdam, la komisiono por kontaktoj kun Ne-Esperantistaj Junularaj Organizaĵoj (NEJO) grandpaŝe ekmarŝis. Dumvoje ĝi jam faris tre utilajn kontaktojn, kaj daŭre ĝi plifirmigas kaj ampleksigas sian ambasadoran laboron.

Aperis 3 numeroj de stencilita bulteno, destinita por kunlaborantoj kaj interesiĝantoj.

La klimakso en 1965 estos seminario apud Ljubljana (6-10 sept.) kie reprezentantoj de NEJO-j diskutos (surbaze de funde antaŭ-preparitaj tezaŭroj) la lingvan problemon en sia laboro. Dank' al la klopodoj en Jugoslavio la organiza flanko jam prosperas. Siaflanke la NEJO-komisiono per intensa laboro esperas allogi multajn NEJO-jn al la seminario, kiu cetere signifos plian kontribuon de TEJO al la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Pro la amasa laboro ĉiam estas bonvenaj akurataj, sindonaj, kapablaj kunlaborantoj, kiuj povas flegi kontaktojn kun iuj NEJO-j, aŭ alimaniere helpi (ekz. por fari tradukojn en naciajn lingvojn). Anoncu vin al la redaktoro de La Juna Vivo.

KORESPONDA SERVO

de TEJO translokiĝis. Nova adreso: Zdzisław Blazejczyk, p.k. 15, GDANSK 12.



La nova junulara jarlibro de Tourcoing enhavas informojn pri la Esperanto-rondo.

SKIRESTADO EN NORVEGUJO

Studenta Esperanto-Societo en Bergen aranĝos en kunlaboro kun "Gangaren" skirestadon, paske, 10-20 de aprilo, en tre konvena tereno sur Hardanger-altebenaĵo. "Gangaren" estas ekskursi societo, kiu ĉefe aranĝas "fakajn" ekskursojn, ekz. geologiajn, botanikajn ktp. kaj havas membrojn inter studentoj kaj instruistoj.


Ni loĝos en somerpaŝtejoj dometoj, reciproke malproksimaj je pluraj kilometroj. Komunuma provizado, sed ĉiu dometo preparos aparte la manĝaĵon.

Ni rekomendas la restadon al naturamikoj. Al luksamantoj ĝi ne konvenos. En malbona vetero, kiam oni plejvole ne skiadas, ni ekzercos nian lingvon per diversaj taskoj kaj konkursoj. Esperantistoj nome loĝos en aparta dometo.

Manĝaĵo kaj dormloko verŝajne kostos ĉ. n.kr. 130.- por ĉiu persono.

Pluaj informoj: Arnljot Kyllingstad, Bohmergt. 22, Bergen, Norvegujo.

La kernaj geanoj de Korea Esperanto-Junularo, kiuj partoprenis UN-seminaron 24 okt. 64 (ĉe Su Ju Ri, Seulo).



21A KONGRESO DE
TEJO

OOTSU - KIOTO
8-15A, AŬGUSTO, 1965

NE DEVUS ESTI...

eĉ unu juna esperantisto, kiu ne ŝparas por unika vojaĝo al Kioto-Oocu.

Ne nur la aparte pitoreskaj Japanaj pejzaĝoj, belaj vilaĝoj, ekskursaj vojaĝoj kaj afablaj vizaĝoj vin atendas, sed plej alloga: la 21-a IJK.

La Gubernio Siga kaj Urbo Oocu ne nur promesis financan subtenon (vidu la malaltajn kotizojn!) sed ankaŭ ĉiujn oportunaĵojn por la sukcesigo de la kongreso.

La organizantoj invitas speciale vin por manifestacio de la tutmonda karaktero de TEJO. Samtempe ĉiuj pli aŭ malpli aĝaj, kiuj ĉeestos la 50-an UK en Tokio, ankaŭ bonvolu konsideri la partoprenon al la 21-a IJK.

Kotizo ĝis 1 aprilo: 18 us. dolaroj. Se vi estas pli ol 20-jara: 20 dolaroj. Nemembro de TEJO: 22 dol.

Post 1 aprilo ĉiuj kotizoj altiĝos je 2 dol. Nuligo de aliĝo eblas ĝis 15 junio; la kotizo

minus 3 dol. estos repagita. Sendu ĉiujn pagojn poŝtmandate kaj ĉiujn poŝtaĵojn aere al:

21-a IJK, Kansai Esperanto-Renmei, 3-10 Nakatu-Hamadori, Ooyodo-ku, **Osaka**. Telegramoj: ESPCENTRO OSAKA.

Petu informilon kaj aliĝilon ankoraŭ hodiaŭ!

NE DEVUS ESTI...

eĉ unu juna esperantisto, kiu, en kazo de neebleco vojaĝi al Kioto, ne ŝparas por partopreno en la konferenco Anne Frank en Amsterdam. Relegu la antaŭan numeron de LJV, kaj konstatu la nerezisteblan aromon de agrablaj, feriaj kaj edukaj, seriozaj ingrediencoj de la programo. TEJO plene rekomendas la konferencon al tiuj, kiuj nepre ne povas rendevui en Japanujo.

NOVAJ DIPLOMITOJ PRI SUPERA INSTRUADO DE LA INTERNACIA LINGVO

La Internacia Ekzamena Komisiono de UEA anoncas, ke s-ro

Metodi Dimitrov Pančev

el Sofio, Bulgarujo, kaj s-ino

Cornelia Taverna

el Trieste, Italujo ambaŭ sukcese trapasis la ekzamenon por la Internacia Diploma pri Supera Instruokapablo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Ambaŭ kandidatoj prezentis sin por la ekzameno en Sofio en 1963 kaj poste ankaŭ verkis disertacion por la ekzameno. La disertacio de s-ro Pančev titoliĝis "La turka lingvo kaj Esperanto (kompara skizo)", dum tiu de s-ino Taverna temis pri "Infero, el la Dia Komedio de Dante Alighieri: komparo inter la tradukoj de Kalocsay kaj Peterlongo".

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Helsingius, S-ro Inga, Turku, Finnlando;
Moerbeek, S-ro R., Winschoten, Nederlando;
Olsson, F-ino Gulli, Strömsnäsbruk, Sved.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

115. Banham, S-ro F. R., Aŭstralio; 116. Boffejon, S-ro H.; 117. Degryse, S-ro A.; Belgujo;
118. d'Amorim, D-ro N. D.; 119. Baggi de Araujo, F-ino I.; 120. Gomes Braga, S-ro I.;
121. Dionisio, S-ro C. H.; 122. Domingues, D-ro C.; 123. Drucker, S-ro G.; 124. Farias, S-ro B. F.; 125. Gama, S-ro Joao de Oliveira;
126. Moreira, S-ro E.; 127. Nunes, S-ro E. Pereira; 128. Pádua, Generalo Geraldo; 129. Pauluk, S-ro José; 130. Rezende, D-ro C.;
131. Souza, S-ro Nelson Pereira de; 132. Vaz, S-ro A. J.; 133. Verde, D-ro Lima, Brazilo;
134. Atkinson, S-ro Wilfrid; 135. Howell, F-ino Barbara; 136. Cartwright, S-ro A. R.; 137. Clarke, S-ro W.; 138. Leather, S-ro A. J.; 139. Lewin, S-ro M.; 140. Mallett, F-ino E. E.; 141. Saunders, S-ino A. J.; 142. Williams, S-ro N. Britujo;
143. Hansen, S-ro E.; 144. Hou, S-ro C. H.; 145. Pedersen, S-ro J., Danlando; 146. Ihander, F-ino O. M.; 147. Jurva, S-ro Arvi;
148. Narvala, S-ro Nils Gösta; 149. Paavali, Cefepiskopo; 150. Timonen, S-ro E.; 151. Vuolo, S-ro L., Finnlando; 152. Lemonnier, F-ino G.;
153. Romand, F-ino A.; 154. Yelland, S-ro E., Francujo; 155. Boscarino, S-ro G. S., Italujo;
156. Bodlaj, F-ino Milka; 157. Jerković, S-ro Inđ. B., Jugoslavio; 158. Henderson, S-ino D., Kanado; 159. Adelaar, F-ino L.; 160. Hoekma, S-ro A. G.; 161. Holleman, S-ro J. V.; 162. Leenhard, S-ro A. A.; 163. d'Oliveyra, S-ro A.;
164. Ponti, S-ro D.; 165. Roelofsen, S-ro Inđ. S., Nederlando; 166. Clarkson, S-ro R. J.; 167. Hall, S-ro W. J.; 168. Moore, S-ro V. R., Novzelando; 169. Zoller, S-ro F., Svislando;
170. Blackstone, S-ro R.; 171. Doneis, Sr. S-ro A.; 172. Doneis, S-ino M.; 173. d'Estries, S-ino M.; 174. Leonard, S-ro Martin C.; 175. Milsted, S-ro H. B.; 176. Oehler, S-ino R.; 177. Simpson, S-ro W. P., Usono.

DONACOJ GENERALA KASO

Chauveau, S-ro L., Francujo : 1.40 gld.;
Michalik, F-ino Frieda, Germanujo : 5.90 gld.;
Moisley, S-ino M.C., Kanado : 33.— gld.;
Hughes, S-ro A., Usono : 7.20 gld.;
Oehler, S-ino R., Usono : 12,82 gld.
Fritsch, D-ro E., Germanujo : 3,— gld.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Anderson, S-ro M.R., Danlando : 10,— gld.;
E.S., Usono : 35,70 gld.; Bosson, S-ro R.H., Eindhoven : 7,—; Holleman, S-ro J.V., Groningen : 10,—; Hoogvliet, S-ro A., Vlaardingen : 3,—; Kamp, S-ro B., Bergen : 10,—; Veen, F-ino D-ro E.H.C.H., Velp : 0,50 gld., Nederlando; Wiltshire, S-ino L., Novzelando : 2,50 gld.

Sumo entute ricevita : 15.961,81 gld.

Sumo elspezita : 15.706,99 gld.

Saldo pozitiva : 254,82 gld.

FONDAJO CANUTO

Slot, S-ro R., Nederlando, 2 MA.

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto, omaĝe al la prezidinto de U.E.A. Prof. D-ro Giorgio Canuto.

DONACO INTERNACIA ARTA TEATRO

Schulze, S-ro William, Usono : 180,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

NOVA SEKRETARIO-KASISTO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Pro la eksigo de la provizora ĝenerala sekretario d-ro Albault, estas elektita kiel nova sekretario-kasisto de la Akademio s-ro Roger Bernard, 26 rue Pierre-Joigneaux, Bois-Colombes (Seine), Francujo; poŝta ĉekkonto 21.929.52 Paris. S-ro Bernard estas la konata tradukinto de pluraj verkoj el la moderna franca literaturo, i.a. de Jean-Paul Sartre.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la januaran numeron.

Radio Bilbao denove disaŭdigas programon en Esperanto ĉiun merkredon de 23.30 ĝis 23.50 per ondo 265 m. (1133 kcs).

Radio Roma. 2-III, Tra la literaturo; 5-III, Italaj provincoj: La Spezia; 9-III, Novaĵoj el Italujo; 12-III, La skolastiko kaj S-ta Tomaso el Aquino; 16-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 19-III, La "Dia Komedio": Infero; 23-III, Leterkesto; 26-III, La "Dia Komedio": Purgatorio; 30-III, Kristana mondo; 2-IV, La "Dia Komedio": Paradizo; 6-IV Tra la literaturo; 9-IV, Italaj belartaj urboj: Parma; 13-IV, Novaĵoj el Italujo; 16-IV, La "Mesio" de G. F. Haendel; 20-IV, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-IV, Epizodoj el la "Dia Komedio": Uliso; 27-IV, Leterkesto; 30-IV, Italaj Nobel-premiitoj: Grazia Deledda. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede).


oficiala informilo
n-ro 377, 1. feb. 1965

akademio

ESPERANTO
EN RADIO

esperanto
marto 1965

H.C. ANDERSEN



LA MARVJRJNETO

*Perlo en la mondliteraturo.
Luksa eldono en granda formato
kun multaj koloraj ilustraĵoj
kaj kun biografio pri H.C. An-
dersen.*

Prezo nur 30 steloj.

Eldonejo Koko - Kolby Kaas



Danlando

Petu la senpagan Koko-revuon

EN LA VENONTAJ MONATOJ

la revuo "Esperanto" aperigos gravajn arti-
kolojn pri lingvistiko, literaturo, telekomuni-
koj, turismo kaj pri aliaj temoj interesaj por
ĉiuj parolantoj de la Internacia Lingvo.

VI RICEVOS AKURATE

ĉiujn eldonojn de "Esperanto" nur se vi jam
pagis aŭ tuj pagos vian kotizon por la nuna
jaro 1965. Do ne prokrastu !

ANONCETOJ

Deziras korespondi en Esperanto. Okcidenta Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko. Ne poŝtmarkoj. S-ino Ross, 20 Heath St., Wandal, Rockhampton, Queensland, Aŭstralio.

Cu ne troviĝas en Britujo eĉ unu virino (libera edziniĝi) kiu povas forigi mian teruran turmentan solecon. Mia aĝo 43, fervojisto, domposedanto. Skribu al S-ro Semaska, 6 New Street, Essington, Wolverhampton.

Oni esperas naturistan vidvinon esperantistan, ne junan, por geedziĝo. Ne gravas raso nek nacieco. Skribu al Luis Ramírez, Naval-moral Mata 25, Madrid (11), Hispanujo.

Eŭropa Ferio-Semajno en Svislando. De la 22-a ĝis la 28a de aŭgusto 1965 okazos en Caslano apud Lugano (Tiĉino) la sepa EFS. Belegaj ferioj, interesaj ekskursoj, kun internacia partoprenantaro. Petu la programon per internacia respondpoŝtkarto de: Samideano Hans Hunkeler, poŝtfako 417, 5001 Aarau.

Apudmara Esperantista Semajno: Sud-francio. 12-19an julio. Por tendumantoj. Informas: Lentaigne, 3, Gaillarde, Montpellier. (respondkuponon).

Düsseldorf, la plej moderna urbo de Okcident-germanujo invitas vin al Germana Esperanto-Kongreso, Herzogstr. 79, Pentekoston 1965. Esperantlingvajn urbprospektojn sendas: Werbe- und Verkehrsamt Düsseldorf, Ehrenhof.

Geonkloj Esperantistaj helpas la infanojn de nia movado per korespondado. Petu detalojn. 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Internacian kongresatmosferon vi ĝuos Pentekoston 1965. Aliĝiloj haveblaj kaj por kvin respondkuponoj: 36 glumarkoj, bele afrankita unuatagkoverto kun esperantlingva poŝtstampo ĉe Germana Esperanto-Kongreso, Düsseldorf, Herzogstr. 79.

Naskiĝo Gregor. Je 25.1.65 naskiĝis al ges-roj D. B. Gregor, el Northampton, Anglujo, filo.

Nova Esperanto-grupo deziras interŝanĝi poŝtkartojn. Keith A. Macdonald aŭ Mike McMahon, City Hall, Las Vegas, Nevada, Usono.

Ĉeĥa studentino deziras korespondi kun la tuta mondo. Fraŭlino Růženka Pavlišová, Ulice 10, května, Miletin, Okres Jičín, Ĉeĥoslovakujo.

Malnovajn Esperanto-librojn nun neaĉeteblajn la Biblioteko de UEA proponas por interŝanĝo kontraŭ duoblaĵoj el aliaj kolektoj. Se vi disponas librojn por interŝanĝo, skribu al: La bibliotekisto, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

VARBU SUBSKRIBOJN POR LA PROPONO AL UNUIGINTAJ NACIOJ !



UZU LA JIK-GLUMARKOJN

*Bela marko kun
nigra surpriso sur
verda kaj blua
desegnaĵo. Aldonu
ĝin al ĉiuj viaj
korespondaĵoj en
la Jaro de Internacia
Kunlaboro !*

*Prezo: 0,40 gld.
(1 rpk.) por unu
folio (10 markoj)*

ESPERANTISTA KAMPADEJO PRIMOŠTEN

ĉe la bordo de
Adriatiko
invitas vin.

Venu
vi ĝuos
lazuran maron
mediteranean klimaton
esperantistan etoson
unikan turistan observatorion.

Loĝebleco
sub tendo
en privataj domoj
en vilaostilaj hoteletoj.

Prezoj nealtaj. Kompleta pensio kosta de
2 ĝis 4 kaj duono da usonaj dolaroj por ĉiu
tago kaj persono, depende de la sezono kaj
elektita loĝloko.

Esperantistoj ĝuas rabaton.

Ĉiujn informojn donas:

Internacia Esperanto-kampadejo **PRIMOŠTEN**
ĉe Šibenik

Jugoslavio

Aperos nova poemkolekto:

TAGKAJERO EN PRIZONO

de

HO CHI MINH

Tradukis el la vjetnama DAO ANH KHA
Granda verko de granda homo. Bele presita
sur bona papero. Eldonkvanto limigita. An-
taŭmendu ĉe: SUNHASABA, 32 Hai Ba
Trung, Hanojo (D.R. de Vjetnamio).

Helsingör

La 18.-25. de julio okazos la internaciaj feriaj
Esp-kursoj (1. perfektiga, 2. konversacia -
kaj 3. prepara kurso por naturmetodaj in-
struontoj) en La internacia Altlernejo en
Helsingør (Danlando), belega loko en parko
kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Sen-
paga prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando

ESPERANTAJ - FRANCAJ - ELDONJOJ

MARMANDE - Francujo

Doktoro L. L. Zamenhof

broŝ. bind.

FUNDAMENTO de ESPERANTO

(5-lingva - 355 paĝoj) 38 st. 50,4 st.

LINGVAJ RESPONDOJ 130 p. 23 st. 31,4 st.

HAMLETO bind. ilustr. 206 p. 40 st.

J. P. Sartre

broŝ

SEN ELIRO - LA RESPEKTEMA

P... 111 p.

(en traduko de Roger Bernard) 24,5 st.

Serio da DEK infanlibroj,
kolorilustr.

28,5 st.

Jean Bacquer

LA KUNPRINCLANDO ANDORO

73 p. 60 fotoj

23 st.

**MENDU ĉe EDITIONS FRANÇAISES
d'ESPERANTO**

11 rue Paul Vergne - MARMANDE - Francujo
Poŝtĉekkonto: 30-900 Bordeaux
(ĉiuj prezoj afrankitaj)

Sub la signo de la verda stelo

19 diverslandaj gesamideanoj rakontas inte-
resaĵojn el sia Esperantista vivo, i.a. Setälä
(Finnlando), Faulhaber (Nederlando), Rosbach
(Norvegujo), Murphy (Anglujo), Ota Ginz
(Israelo), Corso (Italujo), Kustos (Gron-
lando), Heinrich Müller (Germanujo). 72 pĝ.
Formato 15 × 21 cm. Prezo 6,50 dkr. (= 1 us.
dol. = 14 steloj). Havebla ĉe Libro-servo de
U.E.A. aŭ rekte ĉe


Dana Esp. Eldonejo,

Ingemannsvej 9, Åbyhøj, Danlando.

NB. Ni planas duan volumon kaj petas mate-
rialon pri "Interesaĵoj el via Esperantista
vivo", maksimume 4-5 paĝoj po 300 vortoj
en ĉiu kontribuo.

Por mi la nomo signifas Kvalito !

MI DIKTAS MIAJN RAPORTOJN SURLOKE
kun la faktoj ankoraŭ tute freŝaj en memoro.
Kopiado okazas poste. Mia tajpistino diras
ke ŝi tre alte ŝatas la diktilon de Philips
pro ĝia sonklareco kaj facila manipulo.



KIAM MI ESTIS JUNA
ni havis hejme radioaparaton
de Philips. Miaj gepatroj anko-
raŭ posedas ĝin kaj eĉ hodiaŭ
ĝi bone funkcias. Tial mi tre
atentis, kiam antaŭ kelkaj tagoj
mi aĉetis mian propran radion,
ke ĝi portu la emblemon de
Philips!



LA SCIVOLEMON DE VIZITANTOJ
Ĉiam tiklas tiuj misteraj figuroj, blanke
robunitaj kaj kapuĉitaj, laborantaj malantaŭ
vitroj sub timtremiga, blueca lumo. Tiun
lumon elradias bakteri-mortigaj, ultraviolaj
lampoj, nemalhaveblaj ĉe laboro tiel vivdecida
kiel la produktado de antibiotikoj. Tiuj lampoj,
samkiel sennombraj aliaj por uzo en domo
kaj uzino, estas produktoj de Philips.



fido al **PHILIPS** estas tutmonda



Okupante preskaŭ 250.000 kunlaborantojn, Philips estas unu el la plej grandaj elektronikaj industrioj de la mondo. Propraj naciaj organizoj en 55 landoj, agentoj en 115 merkatoj.

LUMO, SONO, RADIO, TELEVIDO, MASTRUMAJ APARATOJ, GRAMOFONDISKOJ, TELEKOMUNIKADO, KEMIAJ KAJ
FARMACIAJ PRODUKTAĴOJ, MEDICINAJ, INDUSTRIAJ KAJ SCIENCAJ APARATOJ KAJ ELEKTRONAJ KONSTRUPARTOJ.